

Date de publication : 05.07.1989

ISSN 0373-0875

Bulletin de la Société linnéenne de Provence  
Numéro spécial 1 (1989)

# NELIKENIĜINTAJ FUNGOJ LIKENLOGAĴ

## Ilustrita determinlibro

verkis

G. CLAUZADE, P. DIEDERICH kaj C. ROUX

desegeenis

G. CLAUZADE kaj C. Roux

Originale verkita en la Lingvo Internacia. Laboraĵo de la Akademio Internacia de la Sciencoj de San-Marino (A.I.S.)

Al nia karmemora amiko, profesoro Charles SAUVAGE

© Eldonita de Société linnéenne de Provence (Marsejlo, Francio). Ĉiuj rajtoj rezervitaj por ĉiuj landoj eĉ U.S.S.R. Traduko de la teksto nur kun la skriba permeso de la aŭtoroj kaj de la eldonisto.

© Edité par la Société linnéenne de Provence (Marseille, France). Tous droits réservés pour tous les pays, y compris l'U.R.S.S. Traduction du texte interdite sans l'autorisation écrite des auteurs et de l'éditeur.

## Enhavtabelo

Mallongigoj.....	4
Avant-Propos / Antaŭparolo.....	5
Determinilo pri la ĉefaj grupoj.....	8
<i>Myxomycotina</i> aŭ mukofungoj .....	10
Determinilo pri la genroj.....	10
Determinilo pri la specioj.....	12
<i>Ascomycotina</i> aŭ askofungoj .....	15
Determinilo pri la genroj.....	15
Determinilo pri la specioj.....	23
<i>Basidiomycotina</i> aŭ bazidiofungoj (determinilo pri la genroj k specioj) .....	94
<i>Cyphomycetes</i> aŭ piknidiofungoj .....	95
Determinilo pri la genroj.....	95
Determinilo pri la specioj.....	97
<i>Holomycetes</i> aŭ hifofungoj.....	107
Determinilo pri la genroj.....	107
Determinilo pri la specioj.....	113
Bibliografio.....	123
Vortaroj (Dictionnaires / Dictionnaires / Wörterbücher).....	125
Alfabeta indekso de la logatoj.....	127
Alfabeta indekso de la genroj, specioj k infraspeciaj taksonoj.....	131

## Mallongigoj

**±** : plimalpli (plus ou moins / more or less / mehr oder weniger)

**ĉ.** : ĉirkaŭ (environ / about / um)

**E** : oriento (= eosto)

**ekz.** : ekzemple

**f.** : formao (= formo speciala = formo biologia)

**fig.** : figuro

**i.a.** : interalie aŭ inter aliaj [entre autre(s) / among others / unter anderem(n)]

**inkl.** : inklude (de)

**J** : I<sub>2</sub> (jodo)

**k** : kaj (et / and / und)

**K** : K OH (kalia hidroksido)

**KJ** : jodo post trakto per K (nepre forigu K per akvado antaŭ aldono de J !)

**maks.** : maksimume

**N** : nordo || HNO<sub>3</sub> (nitrata acido)

**proks.** : proksimume (approximativement, à peu près / nearly, about / ungefähr)

**S** : sudo

**sín.** : sinonimo

**s.s.** : striktasence

**ssp.** (= subsp.) : subspecio

**s.l.** : larĝasence

**tab.** : tabelo

**t.e.** : tio estas (c'est-à-dire / i.e. / das heißt)

**U (= W)** : okcidento (= uesto)

**U.S.A.** = Usono = Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko

**v.** : vidu || vario (= var.)

## Avant-propos

Sur les champignons lichénisés ou lichens se développent fréquemment d'autres champignons, lichénisés ou non, nommés lichénicoles ou épilichéniques. Parmi ceux-ci, les myxomycètes ou *Myxomycotina* sont vraisemblablement tous seulement épiphytes. Quant aux véritables champignons (eumycètes ou *Eumycotina*), lorsque leurs hyphes ne pénètrent pas à l'intérieur de l'hôte, ce qui est d'ailleurs exceptionnel, il sont également épiphytes; dans le cas contraire, de beaucoup le plus fréquent, ils sont parasites, s'ils provoquent des nécroses chez le lichen, ou parasymbiotiques s'ils n'en provoquent pas. En fait, la distinction entre parasite et parasymbiose est généralement malaisée; il est également souvent difficile de déterminer si un champignon situé sur un lichen en mauvais état est parasite ou saprophyte.

Les champignons lichénicoles lichénisés, étudiés avec les autres lichens (voir par exemple CLAUZADE et ROUX, 1985), sont relativement bien connus. Il n'en est pas de même des espèces non lichénisées; en particulier, il existe encore de nombreuses espèces à découvrir, même en Europe, et la description de nombreux taxons est insuffisante.

En 1975, quoique non spécialistes, nous avions jugé utile de faire la synthèse des travaux connus de nous pour élaborer un ouvrage de détermination de ces champignons, aussi pratique que possible. En effet, à cette époque, il existait dans ce domaine seulement deux ouvrages importants, déjà anciens : celui de VOUAUX (1912-1914), relatif à tous les taxons alors connus mais peu pratique (en particulier dépourvu d'index), et celui de KEISSELER (1930) ne traitant que ceux d'Europe moyenne. En dehors de ces deux ouvrages et du travail encore plus ancien d'OLIVIER (1906 et 1907), limité à la France, il n'existe que quelques notes éparses généralement brèves, dont les plus importantes étaient dues à R. SANTESSON (1960) et à VĚZDA (1963, 1969 et 1970).

Grâce à l'obligeance de notre ami regretté, le Professeur Charles SAUVAGE, alors directeur du Laboratoire de Systématique végétale et de Géobotanique méditerranéenne de l'Université des Sciences et Techniques du Languedoc, à Montpellier, nos clés des champignons lichénicoles non lichénisés avaient pu être éditées (CLAUZADE et ROUX, 1976).

Toutefois, à cette époque, nous avions ignoré un certain nombre de publications; et surtout, depuis la parution de notre ouvrage, de nombreux travaux ont été publiés sur les champignons lichénicoles non lichénisés, principalement par le lichenologue et mycologue britannique D. HAWKSWORTH. C'est pourquoi, après étude de toutes ces publications, parmi lesquelles les plus importantes sont certainement "The lichenicolous Hyphomycetes" (1979) et "The lichenicolous Coelomycetes" (1981) de D. HAWKSWORTH, nous avons rédigé de nouvelles clés des champignons lichénicoles non lichénisés, dans lesquelles nous mentionnons aussi (en petit caractères) quelques champignons dont le caractère lichénisé est difficile à déceler. Or, juste après avoir terminé la première version manuscrite de ces clés, nous avons eu la chance de bénéficier de la collaboration du lichenologue et mycologue luxembourgeois Paul DIEDERICH, spécialiste des champignons lichénicoles non lichénisés, que nous remercions ici bien chaleureusement. Grâce à lui, de nombreuses clés ont été complétées, corrigées ou même complètement refaites, et plusieurs genres ainsi que les myxomycètes ont été ajoutés. Malgré cette fructueuse collaboration, nous nous rendons parfaitement compte, comme en 1975, de la témérité de notre entreprise dont le résultat n'est guère qu'un travail de compilation imparfait qui sera bientôt dépassé lorsque de nouvelles révisions seront

publiées. Nous pensons tout de même qu'il sera utile à tous ceux, mycologues, lichenologues, taxinomistes, floristes, phytosociologues..., dont le travail exige la détermination de ces champignons.

Pour faciliter l'utilisation du livre, à l'intérieur des classes, nous traitons les genres par ordre alphabétique. Par ailleurs, pour simplifier les descriptions, nous ne faisons pas la distinction entre paraphyses s.s., pseudoparaphyses et paraphysoïdes, que nous désignons tous sous le nom de paraphyses.

Enfin, nous exprimons nos vifs remerciements à madame Marie-Anne MEYER (Rognay), pour ses conseils concernant la clé des myxomycètes, à madame Marie-Thérèse ZIANO (Apt), pour son aide matérielle, ainsi qu'à messieurs J.-P. BEAU (Velaux), qui a eu la gentillesse et la patience de contrôler la totalité du manuscrit de notre texte, J. DAVID (Kew), J. HAFELLNER (Graz), D. HAWKSWORTH (Kew), P. NAVARRO-ROSINÉS (Barcelone) et R. SANTESSON (Uppsala) pour leurs conseils et les documents qu'ils nous ont fournis,

G. CLAUZADE et C. ROUX

## Antaŭparolo

Ĉe la likeniĝintaj fungoj aŭ likenoj ofte kreskas (aŭ loĝas) aliaj fungoj, likeniĝintaj aŭ ne, nomataj likenloĝaj. El tiuj ĉi, la mukofungoj aŭ *Myxomycotina* estas verŝajne ĉiu nuraj epifitoj. Koncerne la verajn fungojn (eūfungoj aŭ *Eumycotina*), se la hifoj ne enigas en la loĝaton, kazo cetere escepta, tiam ankaŭ ili estas epifitoj; sed en la mala okazo, ja pli ofta, ili estas parazitoj, se ili estigas difektojn ĉe la likeno, aŭ parasimbiozantoj se ili ne estigas difektojn. Fakte, la distingo inter parazito k parasimbiozanto estas ĝenerale malfacila; ofte estas ankaŭ malfacile decidi ĉu fungo, kreskanta sur malbone stata likeno, estas parazito aŭ saprofita.

La likenloĝaj fungoj likeniĝintaj, studitaj kun la aliaj likenoj (v. ekz. CLAUZADE k ROUX, 1985), estas relative bone konataj. Kontraste, la nelikeniĝintaj estas tre malbone konataj; i.a. ankoraŭ ekzistas tre multaj specioj eltrovotaj, eĉ en Eŭropo, kaj la priscribo de multaj taksonoj estas nesufiĉa.

En 1975, kvankam ne specialisto, ni juĝis utila, sintezi la laboraĵojn de ni konatajn por verki plejble oportunan determinlibron pri tiuj fungoj. Efektive, tiam ekzistis tiufake nur du gravaj libroj, jam malnovaj : tiu de VOUAUX (1912-1914), pri ĉiu tiam konataj taksonoj en la tutu mondo sed ne oportuna (i.a. sen indekso), kaj tiu de KEISLER (1930) nur pri la specioj de Mezeŭropo. Krom tiuj du verkoj kaj la eĉ pli malnova laboraĵo de OLIVIER (1906 k 1907) limigita je Francio, ekzistis nur kelkaj notoj ĝenerale mallongaj, el kiuj la plej gravaj verkis R. SANTESSON (1960) kaj VĚZDA (1963, 1969 k 1970). Danke al la komplezo de nia karmemora amiko, profesoro Charles SAUVAGE, tiam direktoro de la Laboratorio pri Vegetaĝa Sistematiiko kaj Mediteranea Geobotaniko ĉe la Universitato pri Sciencoj kaj Teknikoj de Langvedoko, en Montpellier (Francio, Hérault), nia determinlibro estis eldonata en 1976 (CLAUZADE k ROUX, 1976).

Tamen, tiam ni ignoris kelkajn publikajojn; kaj ĉefe, de post la eldono de nia libro, aperis multaj laboraĵoj pri la nelikeniĝintaj fungoj likenloĝaj, precipe far la brita likenologo k mikologo D. HAWKSWORTH. Tial, post studio de ĉiu tiuj publikajoj, el kiuj la plej gravaj estas certe "The lichenicolous Hyphomycetes" (1979) kaj "The lichenicolous Coelomycetes" (1981) de D. HAWKSWORTH, ni verkis novan determinilon de la nelikeniĝintaj fungoj likenloĝaj, en kiu ni mencias (etkarakte) ankaŭ kelkajn fungojn, kies likeneco malfacile videblas. Kaj tuj post la finpretilo de la unua manskribaĵo, ni havis la ŝanco profiti de la kunlaborado de la luksemburgia likenologo kaj mikologo Paul

DIEDERICH, specialisto pri la nelikenigintaj fungoj likenloĝaj, kiun ni ĉi tie tre varme dankas. Danke al li, multaj determiniloj estis kompletigataj, korektataj aŭ eĉ tute reverkataj, kaj pluraj genroj kaj la mukofungoj aldonaĵoj. Malgraŭ tiu fruktodona kunlaborado, ni ja estas konsci, kiel en 1975, de la troriskemo de nia entrepreno, kies rezulto esence estas neperfekta kompilaĵo, kiu baldaŭ maljunigos, kiam novaj revizioj estos publikigitaj. Ni tamen opinias, ke ĝi utilos al tiuj, mikologoj, likenologoj, taksonomistoj, flaŭristoj, fitosociologoj..., kies laboro postulas determinon de tiuj fungoj.

Por plifaciligo de la uzo de la libro, ni pritraktas, interne de la klasoj, la genrojn laŭ alfabeto ordo. Krome, por plisimpligi la priskribojn ni ne distingas parafizojn s.s., pseudoparafizojn kaj parafizoidojn, ĉiujn kiujn ni nomas parafizoj.

Fine, ni kore dankas S-inon Marie-Anne MEYER (Rognay), pro konsilioj pri la determinilo de la mukofungoj, S-inon Marie-Thérèse ZIANO (Apt), pro materia helpo, kaj ankaŭ S-rojn J.-P. BEAU (VELAUX), kiu afable kaj pacience lingve kontrolis la tutan manuskripton, J. DAVID (Kew), J. HAFELLNER (Graz), D. HAWKSWORTH (Kew), P. NAVARRO-ROSINÉS (Barcelona) kaj R. SANTESSON (Uppsala) pro konsilioj kaj sendo de dokumentoj.

G. CLAUZADE et C. ROUX

## Ĉefaj grupoj

### Determinilo pri la ĉefaj grupoj

- AA** Sen micelio. Reproduktaj organoj (sporujoj nomataj **sporofruktoj** aŭ **sporoforoj**<sup>1</sup>) entenantaj tre multajn sporojn globajn, ovoidajn aŭ piroformajn k plejofte ankaŭ filamentojn (kies aro estas nomata **kapillito**), naskiĝantajn el ameboida sincitio (nomata **plasmodio**) k maturstadije lokigintaj sur maldika membrano ne aŭ ne tre distingebla ("hipotalo") ..... **Myxomycotina** aŭ **Mukofungo** (p. 10)
- A** Kun micelio sur kiu naskiĝas reproduktaj organoj tre diferencaj de sporoforoj, kun strukturo multe pli malsimpla (i.a. kun hifoj ± analogaj al tiuj de la micelio) ..... **Eumycotina** aŭ **Eŭfungo** (veraj fungoj)
- BB** Kun tetraspordonaj organoj nudokule aŭ lupee (x 6) videblaj (krom eventualaj aliaj spordonaj organoj, ekz. piknidioj).
- CC** Kun **askofruktoj** (tetraspordonaj organoj malgrandaj, malpli ol 0,1 ĝis 1,5 mm) : aŭ **peritecioj** k askofruktoj peritecioformaj (en formo de ferma ujo entenantaj la himenion, ĉesupre ĝenerale malfermigantaj per poro nomata **ostilo**), aŭ **apotecioj** k askofruktoj apotecioformaj (en formo de klabo, de disko ± konkava aŭ konveksa, ± rond- aŭ long-forma, aŭ de kapo pedunkla aŭ ne, portantaj la himenion nudan). Tetrasporoj (**askosporoj**) interne de mikroskopaj tetrasporanĝoj (**askoj** aŭ sporskoloj). – La plej multaj specioj – ..... **Ascomycotina** aŭ **Askofungo** (p. 15)
- C** Kun **bazidiofruktoj** (tetraspordonaj organoj grandaj aŭ malgrandaj), en formo de ombrello (kun piedo k ĉapelo), de disko, de kuseno aŭ de krusto ± klarlima, sterna sur la substrato. Tetrasporoj (**bazidiosporoj**) sur ± veziketaj celoj (**bazidioj** aŭ sporklaboj). – Tre malmultaj specioj – ..... **Basidiomycotina** aŭ **Bazidiofungo** (p. 94)
- B** Sen tetraspordonaj organoj nudokule aŭ lupee videblaj.
- CC** Kun askoj ne ariaintaj en askofruktoj ..... **Ascomycotina** aŭ **Askofungo**
- DD** Askoj disaj en la himenio de la likeno.
- EE** En la himenio de diversspeciaj *Lecideaceae* s.l.. Sen videblaj konidioj nek micelio. – Formo de *Arthonia glaucomaria* ĉu neotena (HERTEL, 1969) ĉu nenormale difektita pro paraziteco – → **Arthonia** (33. *A. intexta*) (p. 30)
- E** En la himenio de *Umbilicaria crustulosa* ..... → **Phacopsis** (1. *P. crustulosa*) (p. 68)
- D** Askoj malfacile observeblaj, disaj sur micelio el verdete nigraj hifoj interplektaj, kreskantaj sur taloj de *Usnea* aŭ *Cetraria*. Askosporoj (8-14 x 3-7 µm) 8-opaj, globaj, verdete nigraj. Konidioj pli grandaj, elipsoidaj, ruĝe brunaj; konidioforoj kurbaj aŭ viroformaj, kun fino ± senkolora ..... → **Myxotrichum** (*Gymnoascaceae*) (p. 56)
- C** Sen askoj nek bazidioj; tetrasporoj nekonataj ..... **Deuteromycotina = Fungi imperfecti** aŭ **Neperfektaj fungoj**
- DD** Kun **piknidioj**, organoj peritecioformaj sed senaskaj, naskantaj nesekse reproduktivajn sporojn (piknidiosporoj, piknidiokonidioj aŭ, pli mallonge sed

<sup>1</sup> Ni preferis la terminon **sporofrukto** (CHADEFAUD, 1963 : sporocarpe) al **sporoforo**, ĉi kiu, kvankam plejofte uzata, estas laŭ ni malpli klara.

Ĉefaj grupoj

- neprecize, **konidioj**, ĉefine de konidiodonaj ĉeloj portataj aŭ ne de konidioforoj).....*Coelomycetes* aŭ **Piknidofungoj** (p. 95)  
**D** Sen piknidioj.....*Hypocreomycetes* aŭ **Hifofungoj** (p. 107)

## ***Myxomycotina***

Ĉe la likenloĝaj specioj, verŝajne nur epifitaj, la sporofruktoj (= sporoforoj) estas nur duspecaj (sed ekzistas multaj interaj formoj) :

– **sporangioj** ± globaj, diskoidaj aŭ cilindraj, pedunklaj aŭ ne, interne iaoje kun aksa tigo aŭ ĉebaza elstaraĵo (**kolumelo**), kontinua kun la pedunklo kiam tiu ĉi ĉeestas;

– **plasmodiofruktoj** longformaj ofte nereguliformaj kaŭ sinukonturaj, branĉaj aŭ ne, iaoje ajuraj, esceptokaze pedunklaj, senkolumelaj.

### **Determinilo pri la genroj**

**AAA** Sen kapilitio. Kun sporofruktoj (sporangioj) globaj (0,05-0,2 mm), disaj aŭ arigintaj, senpedunklaj, malhele brunetgrizaj, humidastate iom gelatenecaj, maturstadio malfermiĝantaj per operkulo. Sporoj (11-16 µm) ne arigintaj, glatsupraj, izole helege flavetbrunaj, amase brunaj..... **Licea**

**AA** Kun kapilitio konsistanta el filamentoj sen- aŭ tre malmulte-branĉaj, inter si ne rete anastomozaj (maks. kelkaj anastomozoj inter apudaj filamentoj).

**BB** Kapilitiaj filamentoj dikaj (5-10 µm) helicoidaj, kun kuntušaj neregulaj heliceroj, aspektantaj kiel malbone plektitaj kordonetoj, flavaj. Sporoj (plasmodiofruktoj) diversformaj, longformaj, sinukonturaj aŭ ne, subglobaj, 0,3-0,5 mm dikaj, ± arigintaj, senpedunklaj, flavete, rufete aŭ nigre brunaj. Sporoj (10-14 µm) ne arigintaj, malglatet-supraj, flavaj ..... **Hemitrichia**

**B** Kapilitiaj filamentoj plejmulte  $\leq$  2 µm dikaj. Sporoj = sporangioj.

**CC** Kapilitiaj filamentoj helege ruĝaj, sennodulaj. Sporangioj subglobaj (0,3-0,5 mm) arigintaj en amasoj (ĝis 2 mm diametraj) iaoje kuniĝintaj, pedunklaj aŭ ne, helegkoloraj, irizaj, brilaj. Sporoj (10-11 µm) amase arigintaj po 8-14, distingible malglatsupraj (sur la parto ne kuntuša kun la aliaj sporoj), izole helege ruĝaj, amase malintense k malhele ruĝaj ..... **Minakatella**



**C** Kapilitiaj filamentoj brunaj.

**DD** Kapilitiaj filamentoj sennodulaj, multaj k densaj, radiantaj ĉirkaŭ kolumelo duongloba k elstara. Sporangioj diskoidaj, supraflanke tre konveksaj, subaflanke konkavetaj, disaj aŭ arigintaj, preskaŭ ĉiam pedunklaj; pedunklo (1-2 x 0,3-0,6 mm) rufe bruna; disko (0,8-1,8 mm) malhele bruna, kun disaj kretecaj makuloj konsistantaj el kristaloj de  $\text{CaCO}_3$ . Sporoj (10-13 µm) ne arigintaj, fajne dornet-supraj, izole brune grizaj, amase nigretaj ..... **Lepidoderma**

**D** Kapilitiaj filamentoj kun noduloj pli malhelkoloraj.

**EE** Noduloj tre malmultaj k disaj. Kapilitiaj filamentoj multaj k densaj, radiantaj ĉirkaŭ duongloba kolumelo elstara. Sporangioj diskoidaj, supraflanke tre konveksaj, subaflanke konkavaj, arigintaj, pedunklaj; pedunklo (0,4-1,4 x 0,1-0,2 mm) malhele bruna; disko (0,4-0,7 mm) blanka, okreta aŭ hele griza. Sporoj (10-14 µm) ne arigintaj, ± glatsupraj, izole brunaj, amase nigraj ..... **Didymium**

**E** Noduloj tre multaj k interproksimaj k tial kapilitiaj filamentoj (cetero malmultaj) laŭaspekte artikaj. Sporangioj (0,2-0,3 mm) preskaŭ multedraj (pro brilaj





elstaraĵoj respondentaj al dehiskaj linioj), ± dense ariĝintaj, senpedunklaj, nigrete brunaj. Sporoj (7-8 µm) ne ariĝintaj, fajne dornet-supraj, izole helege brungrizaj, amase nigretaj.....*Listerella*

**A** Kun kapilitio konsistanta el filamentoj multebranĉaj.

**BB** Kapilitiaj filamentoj ne rete anastomoza. Sporofruktoj (sporangioj) globaj (0,1-0,3 mm), malhele brunaj, disaj, staraj, longe pedunklaj. Pedunklo (0,5-2,5 mm longa), ĉebaze flavete bruna, ĉesupre pli malhelkolora. Kolumelo bruna, kun longo ĝis 1/3 aŭ 1/2 de la sporangiodiametro, donanta 2 aŭ 3 branĉojn, kiuj naskas kapilition abunde k disdue branĉan. Sporoj (8-9 µm) ne ariĝintaj, granul-supraj, flavetaj sed amase brunaj.....*Macbrideola*

**B** Kapilitiaj filamentoj rete anastomoza.

**CC** Kapilitia reto kun nodoj ne aŭ ne tre ŝvelaj.

**DD** Sporofruktoj (sporangioj) subcilindraj, kun kolumelo laŭaksa, tuboforma, malhele bruna, sur kiu insertiĝas la kapilitio. Sporangioj (1-1,5 x 0,4-0,5 mm) ± dense ariĝintaj, ne aŭ tre mallonge pedunklaj, helegkoloraj, irizaj. Kapilitio sub formo de tre fajna reto tre densa, samkolora al la kolumelo. Sporoj (10-13 µm) ne ariĝintaj, neregule dornet-supraj, izole helegbrunaj, amase malhel-brunaj.....*Comatricha*

**D** Sporofruktoj ne subcilindraj, kun kolumelo malesta aŭ ne tre videbla.

**EE** Sporoj amase ariĝintaj po 4-40.

**FF** Sporofruktoj (plasmodiofruktoj) branĉaj aŭ ne,  $\geq 0,3$  mm dikaj, senpedunklaj, brunaj, ripsupraj. Kapilitio ne tre abunda, bruna. Sporoj 4-12-opaj, fajne granulsupraj (sur la parto ne kuntuša kun la aliaj sporoj), izole preskaŭ senkoloraj, amase rozaj .....*Dianema*

**F** Sporofruktoj (sporangioj) ± globaj aŭ piroformaj, ± dense ariĝintaj, pedunklaj aŭ ne. Kapilitio helkolora, plejofte blanka aŭ blanketa. Sporoj 4-40 opaj, ± malfajne malglat-supraj (sur la parto ne kuntuša kun la aliaj sporoj, ĝenerale malpli malglataj aŭ eĉ glataj sur tiu ĉi), izole malhele violetbrunaj aŭ malhele purpuraj, amase preskaŭ nigraj .....*Badhamia*

**E** Sporoj ne amase ariĝintaj. Sporofruktoj = sporangioj.

**FF** Sporangioj globaj aŭ piroformaj, pedunklaj, staraj aŭ pendaj *Badhamia*

**F** Sporangioj nek globaj nek piroformaj, esceptokaze pedunklaj, staraj.

**GG** Sporangioj diskoidaj (0,3-1,2 mm) supraflanke konveksaj, subaflanke konkavaj, disaj aŭ ariĝintaj, unue brunaj k humidaestate gelatenecaj, poste metale blua k lokiĝintaj sur bazo bruna, humidaste gelateneca. Kapilitiaj filamentoj senkoloraj, brunetaj aŭ purpuretaj, ĉebaze ĝis 4 µm dikaj, ĉefine tre maldikiĝintaj k ĉiam senkoloraj. Sporoj (10-13 µm) dornet-supraj, izole grizaj, amase nigraj .....*Colloderma*


**G** Sporangioj (0,5-0,7 mm) ± neregulformaj (transirantaj al plasmodiofruktoj), disaj, blankaj aŭ grizetaj, ± abunde kovritaj de malgrandegaj kristaloj de  $\text{CaCO}_3$ . Kapilitio senkolora aŭ purpureta. Sporoj (10-15 µm) fajne k dense dornet-supraj, izole helege purpuregrizaj .....*Diderma*



**C** Kapilitia reto kun nodoj ŝvelaj k enkrustitaj de  $\text{CaCO}_3$ , tial kapilitio laŭaspekt'e konsistanta el kalkaj masoj blanketaj, flavetaj aŭ okretaj, kunigitaj de maldikaj filamentoj senkoloraj. Sporoj ne ariĝintaj, fajne granul-supraj.



**DDD** Sporofruktoj (plasmodiofruktoj) longformaj k sinuaj, iafoge eĉ ajuraj, 0,2-0,4 mm dikaj, flav(et)aj. Sporoj (10-13 µm) izole malhele brunaj, amase nigraj .....*Physarum* (1. *Physarum serpula*)



**DD** Sporofruktoj (sporangioj) globaj (0,6-0,8 mm) aperaŭ aŭ tute ne pedunklaj, disaj aŭ ariĝintaj, blankaj ĝis brunaj. Sporoj (12-15 µm) brunaj sed amase nigraj..... *Physarum* (2. *P. albescens*)

**D** Sporofruktoj (sporangioj) en formo de pokalo (0,2-0,8 mm diametra) portata de pedunklo 0,3-1,5 mm longa, ariĝintaj, brunaj. Sporoj (8-10 µm) izole violete brunaj, amase nigraj..... *Craterulum*

## Determinilo pri la specioj

### *Badhamia* Berk.

Multaj specioj, el kiuj 5 observitaj sur likenoj.

- 11 Sporangioj pendaj, piroformaj (0,5-1 mm), ĉefine de pedunklo longa k maldika, tufo ariĝintaj, bluete aŭ violete grizaj. Kapilitio fajna, blanketa. Sporoj (10-14 µm) unue ariĝintaj, poste izolaj, violete brunaj. — Kosmopolita. Sur ŝelo de defalintaj arboj, poliporoj k laŭokaze likenoj —

**1. *B. utricularis*** (Bull.) Berk.

- 1 Sporangioj staraj.

22 Sporoj ne amase ariĝintaj, tre fajne granul-supraĵaj, helege brunaj. Sporangioj globaj aŭ piroformaj (0,4-0,8 mm), ± disaj, verdete grizaj aŭ helege flavaj, portataj de pedunklo (0,4-0,7 mm longa) bruna. Kapilitio el senkoloraj tubetoj entenantaj kelkajn granulojn hele flavajn — Svisio k Skotio. Sur ŝelo k likenoj de surgrundaj falintaj branĉoj —

**2. *B. viridescens*** Meylan

- 2 Sporoj daŭre amase ariĝintaj.

33 Sporoj (9-14 µm) 10-40-opaj, parte fajne granul-, parte ± glat-supraĵaj, malpure purpuraj. Kapilitio blanca ĝis oranĝa. Sporangioj (0,2-0,5 mm) iom plate subglobaj, disaj aŭ ariĝintaj, senpedunklaj, grizaj (ofte blankete, flavete aŭ rozete). — N-hemisfero. Sur-ŝela aŭ -ligna, ofte sur muskoj k likenoj kreskantaj sur ligno aŭ ŝelo —

**3. *B. versicolor*** A. List.

3 Sporoj (11-14 µm) 4-20-opaj, kun supraĵo parte malfajne granula, parte fajnete granula aŭ eĉ ± glat-supraĵa, izole violete brunaj, amase nigraj. Sporangioj ĝenerale senpedunklaj.

44 Sporangioj (0,5-1,5 mm) globaj, ± disaj aŭ ariĝintaj, grizetaj aŭ verdetaj kiam sporohavaj, blankaj kiam sensporaj. Sporoj ĝenerale 6-20-opaj. Kapilitio blanka, kun nodoj ete ŝvelaj. — Verŝajne kosmopolita. Sur folioj, ŝelo, ligno, laŭokaze likenoj, i.a. sur *Xanthoria parietina* —

**4. *B. capsulifera*** (Bull.) Berk.

4 Sporangioj (0,5-1 mm) ± neregule globaj, ovoidaj aŭ iom plataj, flavetaj aŭ verdetaj. Sporoj ĝenerale 6-12-opaj. Kapilitio blanca, flava aŭ oranĝa, kun nodoj ŝvelaj. — Verŝajne kosmopolita. Sur ŝelo k ligno, inter muskoj k likenoj —

**5. *B. nitens*** Berk.

### *Colloderma* G. List.

2 specioj, el kiuj 1 likenloĝa, priskribita en la genrodeteminilo. — Eŭropo, Japanio k U.S.A.. Sur likenoj k muskoj, super morta ligno —

**C. oculatum** (Lipp.) G. List.

**Comatrichia** Preuß

Multaj specioj, el kiuj 1 likenloĝa, priskribita en la genrodeterminilo. – U.S.A.. Sur likenoj k muskoj –

**C. caespitosa** Sturg.

**Craterium** Trent.

6 specioj, el kiuj 1 likenloĝa, priskribita en la genrodeterminilo. – Verŝajne kosmopolita. Precipe sur mortaj folioj, mortaj branĉetoj k morta ligno, sed iaoje ankaŭ sur ŝelo k likenoj –

**C. minutum** (Leers) Fr.

**Dianema** Rex

5 specioj, el kiuj unu likenloĝa, priskribita en la genrodeterminilo. – Britio. Sur ŝelloĝaj hepaticoj k likenoj –

**D. repens** G. List. et Cran

**Diderma** Pers.

Multaj specioj, el kiuj unu likenloĝa, priskribita en la genrodeterminilo. – N-hemisfero. Sur ŝelloĝaj muskoj k likenoj –

**D. chondriodera** (De Bary et Rost.) G. List.

**Didymium** Schrad.

Multaj specioj, el kiuj unu likenloĝa, priskribita en la genrodeterminilo. – Kosmopolita. Sur mortaj folioj, mortaj branĉoj, morta ligno k laŭokaze likenoj –

**D. melanospermum** (Pers.) Macbr.

**Hemitrichia** Rost.

Proks. 10 specioj, el kiuj unu eble likenloĝa, priskribita en la genrodeterminilo. – Eŭropo, Sri Lanko, Japanio k U.S.A.. Sur morta ligno k eble likenoj –

**H. karstenii** (Rostr.) A. List.

**Lepidoderma** De Bary in Rost.

5 specioj, el kiuj unu likenloĝa, priskribita en la genrodeterminilo. – N-hemisfero. Lokloka. Sur putranta ligno de koniferoj inter muskoj k likenoj –

**L. tigrinum** (Schrad.) Rost.

**Licea** Schrad.

Proks. 20 specioj, el kiuj unu likenloĝa, priskribita en la genrodeterminilo. – Eŭropo k U.S.A.. Sur algoj, likenoj k nuda ŝelo de arboj. – Sin. *Orcadella singularis* (Jahn) R. Sant. –

**L. parasitica** (Zukal) Martin

***Listerella*** Jahn

Nur 1 specio, priskribita en la genrodeterminilo. – Eŭropo k U.S.A.. Sur *Cladonia* –  
***L. paradoxa*** Jahn

***Macbrideola*** H. C. Gilb.

5 specioj, el kiuj 1 observita sur *Cladonia* en Savojo, ĉ. 1500 m (far Marianne MEYER), priskribita en la genrodeterminilo, antaŭe konata nur sur arboj k muskoj. – Eŭropo k U.S.A. –

***M. cornea*** (G. List. et Cran) Alexop.

***Minakatella*** G. List.

Nur 1 specio, priskribita en la genrodeterminilo. – U.S.A. k Japanio. Sur ŝelo k ŝelloĝaj likenoj –

***M. longifila*** G. List.

***Physarum*** Pers.

Tre multaj specioj, el kiuj nur du likenloĝaj, priskribitaj en la genrodeterminilo.

11 Sporofruktoj (plasmodiofruktoj) longformaj k sinuaj. – E-Azio, Centra k N-Ameriko.  
 Sur mortaj folioj, ligno, ŝelo, likeno k poliporoj –

***1. P. serpula*** Morg.

1 Sporofruktoj (sporangioj) globaj – N-Ameriko, Svisio k Francio (Savojo). Sur defalintaj folioj, lignopececoj k (observeo de Marianne MEYER, en Savojo) *Cladonia* –

***2. P. albescens*** Ellis ex Macbr.

## Ascomycotina

### Determinilo pri la genroj

**AAA** Sen askofruktoj nek himenio. Askoj disaj.

**BB** Askoj disaj en la himenio de la apotecioj de la likeno. Sen videblaj micelio nek konidioj.

**CC** En la himenio de diversspeciaj *Lecideaceae* s.l. .... *Arthonia* (33. *A. intexta* in *A. glaucomaria*)

**C** En la himenio de *Umbilicaria crustulosa* ..... *Phacopsis* (1. *P. crustulosa*)

**B** Askoj disaj sur micelio el verdete nigraj hifoj interplektaj ĉe la talsupraĵo de *Usnea* aŭ *Cetraria*. Askosporoj (8-16 x 3-7 µm) 8-opaj, verdete nigraj. Konidioj pli grandaj ol la sporoj, ruĝe brunaj; konidioforoj kurbaj aŭ viopoformaj, ĉefine ± senkoloraj..... *Myxotrichum* (*Gymnoascaceae*)

**AA** Kun peritecioj aŭ askofruktoj peritecioformaj (himenio interne de ferma ujo ĉesupre ĝenerale malfermiĝanta per poro nomata ostiolo). Askoj daŭraj ĝis la spor-elaskiĝo, bone videblaj sur sekcao aŭ dispresmajo de matura askofrukteto. [Se himenio detruiganta antaŭ la spor-maturigo ..... → *Pyrgidium*] (§A, p. 19).

**BB** Askofruktoj hel- aŭ viv-koloraj : blankaj, rozaj, ruĝaj, oranĝaj, flavaj... Kun aŭ sen stromo. Sporoj senkoloraj aŭ preskaŭ.

**CC** Askofruktoj (0,5-1 mm) tute enstromaj, karnokoloraj, kun ostiolo ne tre distingbla. Stromo karnokolora, prujnuma, ronda, konveksa..... *Broomella*

**C** Askofruktoj senstromaj aŭ ± elstaraj sur stromo.



**DD** Sporoj (165-175 x 5-6 µm) fadenformaj, 0-septaj, 8-opaj. Sen stromo sed kun subiklo (grupo de densaj haroj ĉebaze de la askofruktoj). Supro de askofruktoj bekforma ..... *Barya*

**Barya** **D** Sporoj ne fadenformaj, multe malpli longaj.

**EE** Sporoj 0-septaj, c. 60-opaj, senkoloraj, ovoidaj aŭ elipsoidaj. Askofruktoj (0,1-0,4 mm) helege citronflavaj ..... *Thelocarpon*

**E** Sporoj septaj, 2-8-opaj.

**FF** Sporoj laŭlarĝe 1-septaj.

**GG** Kun stromo aŭ subiklo ..... *Nectria*

**G** Sen stromo nek subiklo. Askofruktoj senharaj ..... *Nectriella*


**F** Sporoj laŭlarĝe plurseptaj, submurecaj aŭ murecaj.

**GG** Sporoj ŝpiniformaj, ambaŭfine kun fadenforma plilongaĵo (4-12 x 1 µm). Askofruktoj oranĝaj, almenaŭ ĉebaze kovritaj de blanketa feltaĵo. Kun subiklo..... *Paranectria*

**G** Sporoj sen plilongaĵoj.

**HHH** Sporoj laŭlarĝe 3-5-septaj, elipsoidaj.

**II** Sporoj (26-30 x 8-12 µm) 3-septaj. Askofruktoj (0,2 mm) karne rozaj, aŭ oranĝaj, senharaj, globaj, amase arigintaj k elstaraj sur stromo samkolora al ili..... *Nectria* (1. *N. rigidiuscula*)





Trichonectria

I Sporoj ( $23-27 \times 4-5 \mu\text{m}$ ) 3-5-septaj. Askofruktoj (0,1-0,3 mm) ore flavbrunaj. Sen stromo ..... *Sphaerulina* (2. *S. dolichotera*)

HH Sporoj ( $45-120 \times 4-8 \mu\text{m}$ ) vermoformaj, laŭlarĝe tre multseptaj. Sen stromo nek subiklo ..... *Trichonectria*

H Sporoj submurecraj aŭ murecraj. Askofruktoj (0,1-0,2) ± elstaraj. Sen stromo nek subiklo ..... *Pleonectria*

B Askofruktoj brunaj aŭ nigraj.

CC Kun stromo (entenanta la askofruktojn) ne karneca, ronda, ĉesupraje nigra, ĉeinterne nigra aŭ blanketa, ĉeĉirkauje iaoje grizeta aŭ eĉ blanketa.

DDD Sporoj 0-septaj, brunaj, 8-opaj ..... *Anthostomella*

DD Sporoj laŭlarĝe 1-septaj.

EE Sporoj senkoloraj. Stromo 2-3 mm diametra ..... *Plowrightia*

E Sporoj brunaj, neegalĉelaj. Stromo 0,2-1,5 mm diametra. Parafizaro multebranĉa sed malmultanastoza.


FF Stromo globa, elstara ..... *Dothidea*

F Stromo lentoforma, tre plata, ne elstara ..... *Clypeococcum*

D Sporoj laŭlarĝe plurseptaj.

EE Sporoj ± halteroformaj (konsistantaj el du tre distingebaj partoj kunigita de istmo), 4-septaj ..... *Dichosporium*

E Sporoj normalaj, 3-septaj.



Lasiosphaer.

FF Sporoj ( $30-41 \times 8-12 \mu\text{m}$ ) 2-4-opaj, brunaj escepte de la ambaŭ finoj preskaŭ senkoloraj. Stromo pedunkla, branĉa, tre elstara ..... *Lasiosphaeriopsis* (1. *L. salisburyi*)

F Sporoj maksimume  $30 \mu\text{m}$  longaj, 8-opaj, tute koloraj aŭ senkoloraj. Stromo senpedunkla, ± enprofunda en la talo aŭ en la askofruktoj de la likeno. Parafizojoj fadenformaj, ofte branĉaj.

GG Sporoj ( $18-30 \times 3-10 \mu\text{m}$ ) ŝpinilformaj, koloraj aŭ ne. Stromo ĝis 2-3 mm ..... *Homostegia*

G Sporoj ( $13-17 \times 4-5 \mu\text{m}$ ) subŝpinilformaj aŭ oblongaj, senkoloraj. Stromo maks.  $0,5 \text{ mm}$ , ± enprofunda en la talo de *Heterodermia speciosa*, entenanta ankaŭ piknidiojn kun piknidiosporoj c.  $4 \times 1 \mu\text{m}$ . ..... *Telimena*

C Sen stromo. Askofruktoj izolaj aŭ ariĝintaj, ± elstaraj aŭ ± enprofundaj.

DDD Askofruktoj senostiolaj, neregul-dehiskaj. Parafizaro simpla aŭ preskaŭ. Sporoj brunaj, 6-8-opaj.

EE Askofruktoj (0,1-0,2 mm) supraduone haraj, elstaraj sur micelio surlikena, nigre bruna, multebranĉa. Sporoj ( $9-15 \times 4-6 \mu\text{m}$ ) 1-septaj.. *Teratoschaeta*

E Askofruktoj (c.  $0,05 \text{ mm}$ ) senharaj.

FF Askofruktoj elstaraj sur micelio surlikena, nigre bruna, multebranĉa. Sporoj  $10-13 \times 8-10 \mu\text{m}$ , unue globaj k 0-septaj, poste elipsoidaj k laŭlarĝe plurseptaj k eĉ submurecraj ..... *Synaptopsora*

F Askofruktoj enprofundaj en la talo de la likeno. Sporoj globaj ( $6-8 \mu\text{m}$ ) 0-septaj ..... *Orbicula*

DD Askofruktoj (0,1 mm) kun ostiolo ĉefine de speco de longa tubo ( $0,5-0,8 \times 0,05 \text{ mm}$ ). ..... *Rhynchomeliola*



**D** Askofruktoj kun ostiolo maks. ĉesupre de tre mallonga papilo.

**EEE** Askofruktoj almenaŭ supraparte kun haroj aŭ cilioj nigraj, brunaj aŭ grizetaj.

**FF** Sporoj brunaj.

**GG** Sporoj (9-15 x 4-6  $\mu\text{m}$ ), 1-septaj. Askofruktoj (0,1-0,2 mm) supraduone haraj, elstaraj sur micelio surlikena, nigrebruna, multebranĉa. Kun parafizoj, ...  
..... *Teratoschaeta*

**G** Sporoj (11-14 x 5-7  $\mu\text{m}$ ) 1-3-septaj. Sen parafizoj. .... *Koordersiella*

**F** Sporoj senkoloraj aŭ iafoje finevolue bruniĝantaj.

**GGG** Sporoj 0-septaj. Kun parafizoj. .... *Trichosphaeria*

**GG** Sporoj laŭlarĝe 1-septaj.

**HHH** Sporoj 4-8 x 1-2  $\mu\text{m}$ . Parafizoj fadenformaj, finevolue malaperantaj. – Sur maljunaj podocioj de *Cladonia rangiformis* ..... *Niesslia*

**HH** Sporoj 8-11 x 3-5  $\mu\text{m}$ . Senparafiza. – Sur la talo de diversspeciaj *Parmelia* k *Cladonia* – ..... *Echinothecium*

**H** Sporoj 12-16 x 2-5  $\mu\text{m}$ . Senparafiza. – Sur aliaj likenoj .... *Wentiomycetes*

**G** Sporoj laŭlarĝe 1-3-septaj.

**HH** Sur *Peltigera*

**II** Kun parafizoj. .... *Capronia*

**I** Sen parafizoj. .... *Actinopeltis*

**H** Sur foliologaj likenoj tropikaj. Kun parafizoj. .... *Keratosphaera*

**EE** Askofruktoj (0,1 mm) en la triona supro kun 3-6 blanketaj haroj (50-90 x 3-4  $\mu\text{m}$ ) k 10-25 dornetoj (tre malhele brunaj, konikaj, 12-20  $\mu\text{m}$  longaj, ĉebaze 6-12  $\mu\text{m}$  diametraj). Senparafiza. Sporoj (6-7 x 1-2  $\mu\text{m}$ ) 8-opaj, senkoloraj, laŭlarĝe 1-septaj..... *Nitschkiopsis*

**E** Askofruktoj sendornetaj, ĝenerale senharaj sed iafoje ĉebaze ĉirkauitaj de har- etaro aŭ (*Koordersiella*, *Actinopeltis*) ĉirkauostiole kun kelkaj haroj.

**FF** Sporoj almenaŭ finevolue brunaj. [vidu ankaŭ *Orbicula* k *Synatospora* (§ C, DDD, p. 16) senostiolaj]

**GG** Askofruktoj (0,1 mm) kuniĝintaj, kovritaj de pseŭdoparenkima tavolo malhelkolora, sekve formantaj ne klarliman makulon, misformantaj k malglatigantaj la askofruktojn de la parazitito. Parafizaro tre distingebla. Sporoj (16-18 x 5-7  $\mu\text{m}$ ) 8-opaj, 0-septaj..... *Anthostomelia*

**G** Askofruktoj nudaj, klarlimaj.

**HH** Sporoj 16- aŭ pli ol 16-opaj.

**II** Parafizaro almenaŭ maturstadio nedistingebla..... *Muellerella*

**I** Parafizaro bone distingebla, multe branĉa-anastomoza ..... *Rosellinula*

**H** Sporoj 8- aŭ malpli ol 8-opaj.

**III** Sporoj 0-septaj.

**JJJ** Sporoj 4(6)-opaj. Parafizoj multaj k densaj..... *Rosellinia*

**JJ** Sporoj 8-opaj. Parafizoj malmultaj, ne aŭ malofte branĉaj ..... *Adelococcus*

**J** Sporoj 8-opaj. Senparafiza..... *Phaeosporis*

**III** Sporoj laŭlarĝe 1-septaj.

**JJ** Parafizaro bone distingebla. Sporoj ne pli ol 8-opaj ..... *Polycoccum*




*Niesslia*

- J Parafizaro nedistingebla. Sporoj 8-opaj ..... *Endococcus*
- II Sporoj laŭlarĝe plurseptaj.
- JJ Parafizaro nedistingebla.
- KK Kun kelkaj ĉirkaŭostiolaj haroj. Sporoj 8-opaj. ~ Sur folioloĝaj likenoj tropikaj ..... *Koordersiella*
- K Sen ĉirkaŭostiolaj haroj. Sporoj 8-, aŭ malpli ol 8-opaj. ~ Ne sur folioloĝaj likenoj ..... *Phaeospora*
- J Parafizaro bone distingebla.
- KK Sporoj 2-4(6)-opaj ..... *Pyrenidium*
- K Sporoj 8-opaj.
- LL Ostiolo regule cirkla ..... *Leptosphaeria*
- L Ostiolo aspektanta kiel neregula ŝiraĵo ..... *Weddellomyces*
- I Sporoj murecaj aŭ submurecaj, 8- lafoje (*Merismatium lecanorae*) 4-opaj.
- JJ Parafizaro nedistingebla.
- KK Sporoj dikaj haloaj ..... *Polyblastia*
- K Sporoj senhaloaj ..... *Merismatium* (kun *Pleosphaeria*)
- J Parafizaro bone distingebla ..... *Pleospora* (kun *Dacampia*)
- F Sporoj senkoloraj.
- GGG Sporoj tre longformaj ( $8 \leq \text{longo/larĝo} \leq 10$ ), plejmulte ĉemeze maldikiĝintaj, senseptaj. Parafizaro nedistingebla ..... *Sarcopyrenia*
- GG Sporoj tre longformaj ( $\text{longo/larĝo} \geq 15$ ), ĉemeze ne maldikiĝintaj, laŭlarĝe ± distingeble plurseptaj. Parafizaro bone distingebla.
- HH Sporoj 12-16-opaj ..... *Neolamya*
- H Sporoj 8-opaj ..... *Ophiobolus*
- G Sporoj ne tiom longformaj ( $\text{longo/larĝo} \leq 6$ ).
- HHH Sporoj 0-septaj, ĉemeze ne maldikiĝintaj.
- II Sporoj 1-2-opaj. Parafizaro nedistingebla ..... *Spoverinia*
- I Sporoj pli ol 2-, ĝenerale 8-opaj.
- JJ Parafizaro nedistingebla... *Guignardia* (kun *Obryzum* k *Plagiostoma*)
- J Parafizaro bone distingebla.
- KK Sur talo de *Thamnolia*, kiun ĝi misformas ..... *Thamnogalla*
- K Sur aliaj likenoj ..... *Physalospora*
- HH Sporoj laŭlarĝe 1(2)-septaj.
- II Parafizaro almenaŭ komencevolue bone distingebla.
- JJ Sporoj ( $30-50 \times 7-10 \mu\text{m}$ ) 2-4-opaj. Askofruktoj (0,2-0,5 mm) malglataj, kun ostiolo ne elstara, laŭradie 3-4-sulka. Parafizojoj tre dikaj, fruevolue ĵeleiĝintaj ..... *Rhagadostoma*
- J Sporoj maks.  $30 \mu\text{m}$  longaj. Askofruktoj ne malglataj, sensulkaj.
- KK Sporoj ( $16-22 \times 7-8 \mu\text{m}$ ) 8-opaj, kun ĉeloj tre neegalaj (unu globa, la alia longforma, ofte preskaŭ duoble pli longa ol la unua). Askofruktoj (0,4-0,5 mm) diskiformaj aŭ ± globaj. Parafizojoj fadenformaj, maturstadio nedistingeblaj ..... *Melanopsamma*
- K Sporoj 4-8-opaj, kun ĉeloj ne tre neegalaj. Parafizojoj daŭraj.




Sarc.



Spoverinia



Thamno.



J Sporoj maks.  $30 \mu\text{m}$  longaj. Askofruktoj ne malglataj, sensulkaj.

KK Sporoj ( $16-22 \times 7-8 \mu\text{m}$ ) 8-opaj, kun ĉeloj tre neegalaj (unu globa, la alia longforma, ofte preskaŭ duoble pli longa ol la unua). Askofruktoj (0,4-0,5 mm) diskiformaj aŭ ± globaj. Parafizojoj fadenformaj, maturstadio nedistingeblaj ..... *Melanopsamma*

K Sporoj 4-8-opaj, kun ĉeloj ne tre neegalaj. Parafizojoj daŭraj.

- LL** Askofruktoj 0,1-0,4 mm, konusaj. Parafizoj fadenformaj, maldikaj (1-2  $\mu\text{m}$ ) [escepte de 13. *C. collatum*] ; parafizaro simpla ĝis branĉa-anastomoza. Askoj plejofte longformaj. – Generale ĉe ŝelloĝaj likenoj –..... ***Cercidospora*** (kun *Didymella*)
- L** Askofruktoj ĉ. 0,1 mm. Parafizoj ne fadenformaj, dikaj (2-3  $\mu\text{m}$ ) ; parafizaro dense k rete branĉa-anastomoza, laŭaspekte paraplektenkima. Askoj mallongaj, 33-36 x 12-14  $\mu\text{m}$ . – Sur ŝelloĝaj likenoj –..... ***Arthopyrenia***

**I** Parafizaro dekomence nedistingebla. Sporoj  $\leq 22 \mu\text{m}$  longaj.

**JJJ** Sporoj (2)4(6)-opaj. Askofruktoj glataj, malpli ol 0,2 mm.

**KK** Sporoj (18-22 x 8-9  $\mu\text{m}$ ) ĉesepte tre maldikiĝintaj. Askofruktoj konusaj..... ***Stigmidium*** (*12. Pharcidia constrictella*)

**K** Sporoj ne pli ol 5  $\mu\text{m}$  dikaj, ĉesepte ne maldikiĝintaj. Askofruktoj plataj.

**LL** Askofruktoj (< 0,1 mm diametraj) kun ostiolo ĉirkaŭita de 3-6 cilioj brunaj, rigidaj, diverĝaj. – Sur *Peltigera* – ..... ***Actinopeltis***

**L** Askofruktoj ( $\geq 0,1$  mm diametraj) kun ostiolo sencilia. – Sur *Cetraria islandica* – ..... ***Micropeltopsis***

**JJ** Sporoj 8-opaj.

**KK** Askofruktoj (0,1-0,2 mm) tre plataj, ariĝintaj en densaj grupoj ..... ***Microthyrium***

**K** Askofruktoj  $\pm$  konusaj..... ***Stigmidium***

**J** Sporoj pli ol 8-opaj ..... ***Muellerella*** (*6. M. lichenicola*)

**H** Sporoj laŭlarĝe pli ol 2-septaj, submurecaj aŭ murecaj. Askofruktoj glataj (escepte de *Protothelenella*),  $\pm$  konusaj.

**II** Parafizaro bone distingebla.

**JJ** Sporoj laŭlarĝe plurseptaj, neniam submurecaj nek murecaj, 4-8-opaj..... ***Metaspheeria*** (kun *Lethariicola*)

**J** Sporoj submurecaj aŭ murecaj, 8-opaj. Peritecioj globaj aŭ piroformaj, finevolue 1/2 elstaraj..... ***Protothelenella***

**I** Parafizaro nedistingebla.

**JJ** Sporoj nek submurecaj nek murecaj..... ***Sphaerulina***

**J** Sporoj submurecaj aŭ murecaj.

**KK** Sporoj 8-opaj, apenaŭ submurecaj ..... ***Leptosphaerulina***

**K** Sporoj 2-opaj, ete murecaj..... ***Norrlinia***

**A** Kun apotecioj aŭ askofruktoj apotecioformaj (himenio ne interne de ferma ujo, almenaŭ finevolue nuda).

**BB** Askofruktoj unue tute fermaj, poste malfermiĝantaj per  $\pm$  neregulforma poro, finevolue sterniĝantaj (kun himenio nuda), kutime pedunklaj aŭ almenaŭ mal-larĝabazaj k tre elstaraj.

**CC** Himenio detruiganta antaŭ la spormaturiĝo, tial naskanta mazedion, t.e. amaso unue gelateneca, poste pulvoreca, entenanta sporojn k defalajojn de askoj k de parafizoj.

**DD** Askofruktoj  $\leq 0,3$  mm, pedunklaj aŭ tre elstaraj.

**EE** Sporoj maturstadiie verdaj, 1-3-septaj..... ***Microcallicium***

**E** Sporoj maturstadiie brunaj.

**FF** Sporoj 0-septaj. Askofruktoj ne aŭ apenaŭ pedunklaj..... *Sphinctrina*  
**F** Sporoj 1-septaj.

**GG** Askofruktoj pedunklaj, apotecioformaj..... *Calicium*  
**G** Askofruktoj senpedunklaj, peritecioformaj ..... *Pyrgidium*

**D** Askofruktoj (0,5-0,8 mm) ne tre elstaraj, finevolue konveksaj, almetaj sur la talo de ŝelloĝaj *Pertusaria*. Sporoj malhele brunaj, 1-septaj, kun suprao tre malglata, granuleca-fendega..... *Cyphelium*

**C** Himenio ne detruiganta antaŭ la spor-maturiĝo (askofruktoj sen mazedio).

**DD** Sporoj almenaŭ finevolue brunaj. Askofruktoj nigraj, neniam urceolaj.

**EEE** Sporoj 0-septaj. Askofruktoj pedunklaj aŭ ne ..... *Chaenothecopsis*

**EE** Sporoj 1-septaj.

**FF** Askofruktoj pedunklaj..... *Chaenothecopsis*

**F** Askofruktoj ne pedunklaj..... *Buellella*

**E** Sporoj 5-7-septaj ĝis murecaj..... *Tryblidaria* (1. *Polyschistes mairei*)

**D** Sporoj senkoloraj aŭ heleg-flavetaj aŭ -rozetaj. Askofruktoj senpedunklaj, unue globaj, kun himenio komencevolue kovrita de ± rezistema tavolo nur maturstadio ŝiriĝanta, tiam formanta randaĵon ± neregulan, loban, franĝan, sulkana aŭ strian, preskaŭ ĉiam daŭran. Parafizoj fadenformaj, simplaj aŭ malofte branĉaj. Sporoj 8-opaj.

**EE** Sporoj (30-36 x 2 µm) tre longformaj, fadenformaj, 0-septaj..... *Stictis*

**E** Sporoj elipsoidaj aŭ subšpinilformaj, ĝenerale malpli ol 30 µm longaj.

**FF** Askofruktoj almenaŭ komencevolue enprofundaj en la talo de la likeno.

**GG** Askofruktoj maturstadio urceolaj : randaĵo dika, sulka, stria aŭ preskaŭ glata, apuddiske kun mikroskopaj haroj (mikroskopu x300 l). Parafizoj simplaj, fadenformaj..... *Skyttea*

**G** Askofruktoj kun disketo fruevolue sterniĝanta k randaĵo daŭra aŭ ne.

**HH** Sporoj 0-septaj.

**II** Askofruktoj (c. 0,1 mm) nigretaj, tre fruevolue senrandajaj. – Ĉe *Thamnolia* – ..... *Stegia*

**I** Askofruktoj (≥ 0,1 mm) flavaj ĝis violete ruĝaj, daŭre randajaj ..... *Orbilia*

**H** Sporoj (12-24 x 4-8 µm) laŭlarĝe 1-3-septaj. Askofruktoj almenaŭ 0,2 mm, daŭre randajaj, ariĝintaj en distingible cirkla grupoj. – Ĉe *Peltigera* – ..... *Phragmonaevia*

**F** Askofruktoj dekomence sur la talsupraĵo de la likeno, unue urceolaj, poste tre sternadiskaj.

**GG** Sporoj 0-septaj.

**HH** Askofruktoj (0,2-0,4 mm) kun disketo flavete blanka aŭ helege oranĝa, ebena, elstaraj, kun randaĵo, finevolue malaperanta, iom pli helkolora ol la disketo. Sporoj 7-12 x 2-4 µm ..... *Pezizella*

**H** Askofruktoj kun disketo sekastate malhelkolora ..... *Mollisia*

**G** Sporoj laŭlarĝe 1-septaj ..... *Niptera*

**B** Askofruktoj neniam tute fermaj nek pedunklaj, kun himenio dekomence nuda, daŭra ĝis la spor-maturiĝo, sen mazedio.

**CC** Askofruktoj eksciplohavaj k sekve almenaŭ komencevolue ĝenerale randajaj

**DD** Sporoj senkoloraj aŭ apenaŭ koloraj.

**EEE** Askofruktoj tute hel- aŭ viv-koloraj.

**FF** Sporoj ( $40-60 \times 1 \mu\text{m}$ ) tre longformaj, laŭlarĝe 3-4-septaj (ofte ne tre videble), 6-8-opaj ..... *Nanostictis*

**F** Sporoj ne tre longformaj ( $< 40 \mu\text{m}$ ), 0-1-septaj.

**GG** Sporoj 0-septaj

**HH** Sporoj proks. 60-opaj ..... *Thelocarpon*

**H** Sporoj 8-, malofte 4-opaj.

**III** Askofruktoj blanketaj aŭ flavetaj ..... *Pezizella*

**II** Askofruktoj flavaj ĝis violeta ruĝaj, humidastate preskaŭ gelatenecaj ..... *Orbilia*

**I** Askofruktoj (1,5 mm) skarlate ruĝaj (iom brunete), kun disko unue konkava, poste ebena aŭ konvekseta. Parafizoj fadenformaj, multeseptaj; parafizaro nur ĉespre branĉa. Sporoj ( $20-25 \times 10-13 \mu\text{m}$ ) 8-opaj, elipsoidaj, senkoloraj aŭ rozetaj ..... *Discocera*

**G** Sporoj 1-septaj.

**HH** Askofruktoj ( $0,2 \text{ mm}$ ) disaj, citronflavaj, haretkovritaj. Sporoj ( $15-18 \times 5-9 \mu\text{m}$ ) 4-8-opaj, ŝpiniformaj, flavetaj, ĉesepte ne maldikiĝintaj. *Lachnella*

**H** Askofruktoj blankaj aŭ karne rozaj, senharaj ..... *Niptera*

**EE** Askofruktoj kun disko blanketa k dikia randaĵo nigreta. Sporoj fadenformaj, 8-opaj ..... *Stictis*

**E** Askofruktoj kun disko malhele bruna, nigra aŭ nigreta.

**FFF** Sporoj 0-septaj.

**GG** Sporoj 4-8-opaj.

**HHH** Askofruktoj ( $< 0,1 \text{ mm}$ ) kun disko nigreta, ĉirkaŭita de blanketa randajo neregule denta, eksteraparte kovrita de nigretaj cilioj ..... *Mollisia* (1. *M. collematis*)

**HH** Askofruktoj ( $< 0,1 \text{ mm}$ ) nigretaj, tre fruevolue senrandajaj. – Ĉe *Thamnolia* – ..... *Stegia*

**H** Askofruktoj ( $> 0,1 \text{ mm}$ ) kun randaĵo bruna aŭ nigra, sencilia ..... *Nesolechia* (kun *Lecidea* k *Carbonea*)

**G** Sporoj pli ol 100-opaj ..... *Sarea*

**FF** Sporoj laŭlarĝe 1-septaj.

**GG** Sporoj ( $25-35 \times 1-2 \mu\text{m}$ ) tre longformaj : longo/larĝo  $> 10$  ..... *Pleospilis*

**G** Sporoj ne tre longformaj : longo/larĝo  $< 5$ .

**HH** Sporoj pli ol 8-opaj ..... *Pleoscutula* (kun *Catillaria*)


**H** Sporoj 4-8-opaj.

**II** Askofruktoj  $\pm$  regule rondaj.

**JJ** Askofruktoj humidastate sternadiskaj, sekastate kuntiraj k preskaŭ globaj. Sporoj komencevolue haloaj ..... *Niptera* (2. *N. lichenicola*)

**J** Askofruktoj sekastate ne kuntiraj. Sporoj senhaloaj ..... *Scutula* (kun *Killiasia*)

**I** Askofruktoj longformaj, iaoje branĉaj (lireloformaj) ..... *Melaspilea* (kun *Hemigrapha*)




- F** Sporoj plurseptaj, 6-8-opaj.  
**GG** Sporoj nur laŭlarĝe septaj.  
**HH** Askofruktoj longformaj, branĉaj aŭ ne ... *Opegrapha* (kun *Lecographa*)  
**H** Askofruktoj rondformaj.....*Arthroraphis* (kun *Bacldia* k *Mycobllimbia*)  
**G** Sporoj submurecaj aŭ murecaj.....*Tryblidaria*
- D** Sporoj maturstadio brunaj [Se himenio detruiganta antaŭ la spormaturiĝo  
→ *Cyphellum* ].  
**EE** Sporoj haloaj, truevolue malhele brunaj, 1-3-septaj. Parafizaro branĉa-anastomoza. Himenio J+ (blua).....*Rhizocarpon*
- E** Sporoj senhaloaj.  
**FFF** Sporoj laŭlarĝe 1-septaj.  
**GG** Askofruktoj ± regule rondaj.  
 **HH** Parafizaro sen- aŭ malmulte-branĉa. Himenio J+ (blua).  
 **II** Sporparieto malmulte k regule dikiginta....*Buellia* (kun *Dactylospora*)  
 **I** Sporparieto tre k neregule dikiginta.....*Rinodina*  
**H** Parafizaro branĉa-anastomoza.  
**II** Askofruktoj kun disketo dekomence sterna.  
**JJ** Himenio J+ (blua).  
**KK** Hipotecio bruna. Himenio 60-100 µm. Askosupro J+ (blua). – Likenigintaj –.....*Epilichen*  
**K** Hipotecio senkolora aŭ flaveta. Himenio 130-170 µm. Askosupro J. – Ne likenigintaj – .....*Stratisporella*  
**J** Himenio ne J+ (blua).....*Karschia*  
**I** Askofruktoj unue fermaj, poste kun poro ofte ĉirkaŭita de radiaj fendoj, finevolue en formo de disketo ± ebena, maldike randaj. Himenio k hipotecio senkoloraj, J-. Sporoj hele brunaj, ĉesepte iom maldikiĝintaj, ne-egalĉelaj.....*Buellia*
- G** Askofruktoj longformaj, iafoje branĉaj. Parafizaro branĉa aŭ ne, sen-anastomoza.....*Melaspilea* (kun *Hemigrapha*)  
**FF** Sporoj laŭlarĝe plurseptaj, submurecaj aŭ murecaj.  
**GG** Parafizaro branĉa-anastomoza. Himenio J+ (blua aŭ ruĝa) .....*Opegrapha* (kun *Lecographa*)  
**G** Parafizaro ne aŭ ne tre branĉa-anastomoza. Himenio J+ (blua).....*Buellia* (kun *Dactylospora*)  
**F** Sporoj submurecaj aŭ murecaj.  
**GG** Sporoj submurecaj aŭ ete murecaj. – Sur krustecaj likenoj – *Tryblidaria*  
**G** Sporoj tre murecaj. Sur talo de *Cladonia*.....*Diploschistes*
- C** Askofruktoj seneksciplaj, tial senrandaj aŭ kun falsa randajo.
- DD** Sporoj 0-septaj, senkoloraj.  
**EE** Sporoj 16- aŭ pli ol 16-opaj.....*Agyrina*  
**E** Sporoj ne pli ol 8-opaj.  
**FF** Askofruktoj helkoloraj, humidastate ± gelatenecaj...*Agyrium* (kun *Skytella*)

- F** Askofruktoj malhelkoloraj, ĝenerale nigraj, humidastate ne gelateneca j ..... *Phacopsis*
- D** Sporoj laŭlarĝe 1- aŭ plur-septaj (ĝenerale 3-) Askofruktoj malhelkoloraj, iafoge prujnumaj.
- EE** Askofruktoj (0,1 mm) konsistantaj nur el falsa histo el globaj ĉeloj (interne de la askofruktaj senkoloraj, ĉesupraje de tiu ĉi brunaj), entenantaj po kelkajn askojn elipsoidajn aŭ subglobajn (20-26 x 13-20 µm). Sporoj (9-13 x 4-7 µm) 4-8-opaj, 1-septaj, ĉesepte ne aŭ ne tre maldikiĝintaj, junstadie senkoloraj k haloaj, maturstadiis brunaj k senhaloaj ..... *Lichenostigma*
- E** Askofruktoj kun himenio el askoj (klabo- aŭ piro-formaj) k parafizaro (multe branĉa-anastomoza). Sporoj senhaloaj.
- FF** Himenio J-. Maturaj sporoj brun(et)aj, plejmulte 1-septaj..... *Abrothallus*
- F** Himenio J+ (blua aŭ ruĝa). Maturaj sporoj plejofte senkoloraj.
- GG** Himenio interrompita de grupoj el sterilaj hifoj nigretaj..... *Plectocarpon*
- G** Himenio sen nigretaj hifoj..... *Arthonia*

### Determinilo pri la specioj

#### *Abrothallus* De Not.

Genro ankoraŭ tre malbone konata, ŝajne entenantaj nur nelikenigintajn fungojn likenloĝajn. Askofruktoj senrandaj, unue ensubstrataj, poste almetataj, ĉe la plej multaj specioj jen prujnumaj jen senprujnumaj, kun sporoj 8-opaj k kun himenio J-, ĉi kio ebligas facilan distingon de la brunsporaj *Arthonia* k de la *Dactylospora* sen tre disting-ebla eksciplo.



11 Sporoj (14-20 x 5-7 µm) 1-3-septaj, maturstadiis hele brunaj. Askofruktoj (0,3-0,4 mm) tre fruevolue konveksaj. Epitecio bruneta; hipotecio malhele bruna. – Eŭropo. Sur talo k apotecioj de *Ramalina* – **1. A. suecicus** (Kirschst.) Nordin

1 Sporoj 1-septaj.

22 Sur askofruktoj de *Cladonia cariosa* k eble sur alispeciaj *Cladonia*. – Specio priskribota far SANTESSON (HAWKSORTH, 1977). – U.S.A. (Missouri) k verŝajne aliaj landoj. – Non *Lichenoconium cladoniae* (Ellis et Everh.) Petr. et Syd. – **2. A. cladoniae** (Ellis et Everh.)

2 Sur talo, pli malofte apotecioj, de multaj likenspecioj foliecaj k arbedecaj. Sporoj ofte neegalcelaj, ĉesepte ne aŭ ne tre maldikiĝintaj.

33 Vegetativaj hifoj J+ (blua), ne modifantaj la talon de la likeno. Askofruktoj ofte senprujnumaj.

**6** Eksciplobazo ne ruĝeta. Askofruktoj ne tre dense ariĝintaj.

**7777** Sporoj (6-8 x 2-4 µm) ne tre neegalĉelaj, ĉesepte ne aŭ ne tre maldikiĝintaj.

**88** Askofruktoj tre malgrandaj (ĉ. 0,03 mm). – Siberio. En talo de *Porocyphus coccodes* –

**21. Pharcidia porocyphi** (Stein) Wint.

**8** Askofruktoj 0,1-0,2 mm. Himenio J+ (blua). – Argentinio (apud La Plata). En talo de *Lobaria quercizans* f. *casarettiana* (De Not.) Zahlbr. –

**22. Pharcidia microspora** (Speg.) Vouaux

**777** Sporoj 10-12 x 8-10 µm. – En talo de *Physconia* –

→ **Cercidospora** (10. "Didymella" weillii)

**77** Sporoj 8-14 x 2-5 µm, ne aŭ ne tre neegalĉelaj, ĉesepte ne aŭ ne tre maldikiĝintaj. Askofruktoj < 0,1 mm.

**888** Sporoj 8-12 x 2-4 µm, 1-septaj.

**999999** En talo de *Anaptychia ciliaris*. Askofruktoj tre multaj.

→ **4. Stigmidiump hageniae**

**99999** En talo de *Ramalina bourgeana* k de *R. decipiens* Mont.. – Kanarioj –

→ **2. Pharcidia epiramalina**

**9999** En talo de *Parmelia variolosa* Dodge et Baker. – Antarkto.

**23. "Thelidiump" parvum** Dodge et Baker

- 999 En talo de *Solorina saccata*. – Eŭropo. Lokloka –  
**24. Stigmidium solorinum** (Vain.) D. Hawksw.
- 99 En talo de *Baeomyces carneus*. – Eŭropo. Lokloka –  
**25. Pharcidia conlodes** (Nyl.) Sacc.
- 9 En talo de *Toninia caeruleonigricans*. – Eŭropo. Lokloka –  
**26. Stigmidium glebarum** (Arnold) Haf.
- 88 Sporoj 9-14 x 2-5 µm, 1-3-septaj. En talo kaŭ apotecioj ĉefe de krustecaj likenoj.  
 ——————  
**16. Stigmidium schaeereri**
- 8 Sporoj 8-12 x 4-5 µm, 1-septaj. – Eŭropo. En talo de *Acarospora fuscata* –  
**27. Stigmidium fuscatae** (Arnold) R. Sant.
- 7 Sporoj (12)14-22 x 3-9 µm.
- 88 Askofruktoj < 0,1 mm.**
- 999 Sporoj 12-21 x 7-9 µm – Francio (ĉirkaŭaĵo de Versailles). En talo de *Trapelia coarctata* –  
**28. Pharcidia coarctatae** (B. de Lesd.) Keissl.
- 99 Sporoj 14-16 x 5-6 µm. – SE-Francio (ĉirkaŭaĵo de Aix-en-Provence). Parasimbioza al la talo de *Lempholemma chalazanum* (ki tiu kun la algo *Nostoc sphaericum*) sed ankaŭ simbioza al *Nostoc microscopicum* k konsistiganta likeno nomatan *Pyrenocollema aquense* De Croz. et Dughi –  
**29. Pharcidia collematis** Dughi
- 9 Sporoj 14-18 x 3-5 µm. – Aŭstria Tirolo. En talo de *Lecania cyrtella* –  
**30. Pharcidia punctillum** (Arnold) Wint.
- 88 Askofruktoj 0,1-0,2 mm.
- 99 Askoj preskaŭ cilindraj. Askofruktoj en ± densaj grupoj. Sporoj (14-20 x 5-7 µm) elipsoidaj, ĉesepte ne maldikiĝintaj. – En talo de *Lecanora cf. argentata* k de *Phaeophyscia orbicularis* –  
 ——————  
**13. Pharcidia thallina**
- 9 Askoj ± ŝvelaj, piro- aŭ klabo-formaj.
- 10.10** En talo k apotecia tala randajo de *Ramalina complanata* (Sw. ex Ach.) Ach.. Sporoj (12-15 x 4-5 µm) subcilindraj, iafoge kurbetaj, egalĉelaj, ĉesepte ne maldikiĝintaj. Askofruktoj ĉ. 0,1 mm. – Brazilio (apud Apiahy) –  
**31. Pharcidia ramalinae** (Müll. Arg.) Vouaux
10. En krustecaj aŭ skvametaj likenoj. Sporoj egal- aŭ ± neegal-ĉelaj, ĉesepte ne aŭ ne tre maldikiĝintaj.
- 11.11** Sporoj  $\geq$  17 µm longaj.
- 12.12** Sporoj 21-22 x 6-9 µm ± klaboformaj, neegalĉelaj, ĉesepte ete maldikiĝintaj. Askofruktoj ĉ. 0,1 mm. – N-Francio (Malo-les-Bains). En talo de *Verrucaria muralis* –  
**32. Pharcidia maritima** B de Lesd.
- 12.** Sporoj 17-22 x 4-5 µm, 1(2-3)-septaj, malmulte neegalĉelaj, ĉesepte ne maldikiĝintaj. – Eŭropo k Kanarioj. En talo de *Arthonia radiata* –  
**33. Pharcidia arthoniae** (Arnold) Wint.
11. Sporoj  $\leq$  17 µm longaj.
- 12.12** Sporoj (14-17 x 6-7 µm) malmulte neegalĉelaj, ĉesepte ne maldikiĝintaj. – Duoninsulo Kola. En talo de *Protothelenella sphinctrinoides* –  
**34. Pharcidia haesitans** (Nyl.) Vouaux
- 12.** Sporoj (11-16 x 3-6 µm) ± neegalĉelaj, ĉesepte ne aŭ ne tre maldikiĝintaj. Askofruktoj diversaspektaj, 1- aŭ kelk- (plejofte 2-3)-opaj. – Eŭropo. En talo k askofruktoj de multaj krustecaj k de kelkaj skvametaj likenspecioj. – Sin. *Pharcidia badia* (Arnold) Wint., *P. conspurcans* (Th.)



Fr.) Wint., *P. lichenum* Arnold, *P. rhexoblephara* (Vain.) Sacc., *P. rhyparella* (Nyl.) Zopf – **35. Stigmidiump dispersum** (Lahm ex Körb.) D. Hawksw.

8 Askofruktoj 0,2-0,4 mm. Sporoj ĉealte ne aŭ ne tre maldikiĝintaj.

 99 Sporoj (15-20 x 6-8 µm) ± klaboformaj. – Skotio (Ben Lawers). En talo de *Polyblastia theleodes* – **36. Stigmidiump superpositum** (Nyl.) D. Hawksw.

9 Sporoj (13-15 x 3-4 µm) spiniformaj. – Ĉinio k Japanio. En apotecioj de *Sticta damaecornis* (Sw.) Ach. – **37. Pharcidia cupularis** Pat.

### *Stratisporella* Haf.

Nur unu specio : Askofruktoj (0,2-0,4 mm) ± ebendiskaj, ariĝintaj en gajloj de la talo de *Trametyllum angolense* Nyl. Eksciplo malhele bruna ; epitecio hele bruna. Askoj 80-150 x 9-12 µm. Sporoj (13-21 x 5-7 µm) preskaŭ egalĉelaj, ĉealte ne maldikiĝintaj, 1(2)-septaj. – Angolo – **S. episemoides** (Nyl.) Haf.

### *Synaptospora* Cain

11 Sporoj (10-13 x 8-10 µm) unue subglobalaj, poste elipsoidaj, unue 0-septaj, poste iaoje laŭlarĝe septaj ĝis submurecaj. – Britio. sur talo de diversspeciaj likenoj (*Ochrolechia*, *Pertusaria*, *Placopsis* k eble *Protoblastenia cinnabarinus*) –

**1. S. tartaricola** (Nyl.) Cain

1 Sporoj (ĉ. 6 x 4 µm) ĉiam 0-septaj. – Antarkto (Queen Mary Land). Sur talo de *Buellia muscicola* Dodge et Baker – **2. "Orbicula" buelliae** Dodge

### *Telimena* Racib.

Nur unu likenloĝa specio, el S-Hindio, verŝajne ne apartenanta al la genro.

**"T." foreau** F. Moreau

### *Teratoschaeta* Batista et Fonseca

Nur unu specio, kies precipaj karakteroj kuŝas en la genro-determinilo. Suplementa priskribo :

Miceliaj hifoj kun hifopodoj (tre mallongaj branĉoj 1-ĉelaj) pintfinaj k elkreskajoj ameboidaj, sur ĉi kiuj staras konidioforoj brunaj, septaj, senbranĉaj, finigantaj per unu aŭ kelkaj konidiodonaj ĉeloj (22-70 x 4-8 µm) verdete brunaj. Konidioj (11-17 x 4-6 µm) brunaj, laŭlarĝe 1-3-septaj. – Brazilio, Rondonio. Sur diversspeciaj likenoj foliololoĝaj – **T. rondoniensis** Batista et Fonseca

### *Thamnogalla* D. Hawksw.

Peritecioj (0,1-0,2 mm) ĉirkaŭostole helegkoloraj (blankataj, rugetaj aŭ brune verd-etaj), estigantaj vezikecajn misformajojn sur la talo de *Thamnolia*. Sporoj (8-11 x 3-5 µm) subspiniformaj. Parafizoj fadenformaj, senbranĉaj. – Svedio, Skotio, Francio (Burgonjo) k Alasko – **T. crombei** (Mudd) D. Hawksw.

***Thelocarpon* Nyl. ex Hue**

Dudeko da specioj el regionoj malvarmaj k milde malvarmaj, el kiuj du likenloĝaj, konataj nur en Eŭropo.

- 11 Askofruktoj ĉiam peritecioformaj, kun mallarĝa ostiolo. – Ŝajne ĉiam ± likeniĝinta. – Sin. *T. conoidellum* Nyl. –  
 1. *T. epibolum* Nyl.  
 αα Sporoj 4-6 x 1-2 µm. – Milde malvarmaj regionoj. Sur ligno, vegetaj defalaĵoj, humo, maljunaj  
 likentaloj, poliporacoj... – *v. epibolum*  
 α Sporoj 6-12 x 2-3 µm. – Montaroj k malvarmaj regionoj. Sur taloj de *Peltigera*, *Solorina*, *Baeomyces*... –  
*v. epithallinum* (Leight.) G. Salisb.  
 1 Askofruktoj nur komencevolue peritecioformaj, tre fruevolue en formo de sterna  
 disko senrandaĵa, preskaŭ tiel dikaj kiel larĝa. Sporoj 6-8 x 1-2 µm. – Mezeŭropo.  
 Sur *Baeomyces rufus*. – Sin. *Ahlesia lichenicola* Fuck. –  
 2. *T. lichenicola* (Fuck.) Poelt et Haf.

***Trichonectria* Kirschst.**

Nur unu likenloĝa specio : Askofruktoj helege oranĝaj, diafanaj, kovritaj de haretaj blankaj, rigidaj. – Eŭropo. Sur diversspeciaj krustecaj taloj šel-, ligno- aŭ humeloĝaj. – Rim. : Kune kun la perfekta formo, ĉiam kreskas anamorfo apartenanta al *Cylindrocarpon (Hyphomycetes)*, formanta rozajn makulojn (10-20 mm), kun konidiodonaj ĉeloj (ĝis 85 x 1 µm) senkoloraj, 0-septaj, k konidioj (35-60 x 4-6 µm) senkoloraj, ŝpiniformaj ĝis subcilindraj, laŭlarĝe 4-11-septaj – *T. hirta* (Blox.) Petch

***Trichosphaeria* Fuck.**

Nur unu specio : Askofruktoj (0,1 mm) globaj ĝis subkonusaj, densaj, karbe nigraj, kovritaj de rigidaj haretaj. Sporoj (6-9 x 2 µm) ŝpiniformaj. – Francio (Arbaro de Fontainebleau). Sur talo de *Peltigera canina* – *T. lichenum* P. Karst. et Hariot.

***Tryblidaria* Sacc.**  
**(= *Polyschistes* auct. non Steiner)**

- 11 Sporoj  $\geq 22 \times 9$  µm. Askofruktoj nigraj, senprujnumaj.  
 22 Himenio J-, 125-180 µm alta. Askofruktoj elstaraj, unue konveksaj, tute fermaj k  
 ĉ. 0,5 mm diametraj, poste malfermiĝantaj per neregula poro ĉirkaŭita de 5 laŭ-  
 radiaj fendoj, finevolue en formo de kupulo aŭ de disko ĉecentre kava, ĉ. 1 mm  
 diametraj. Ekscipo nigre bruna; hipotecio senkolora aŭ flaveta. Sporoj (22-46 x  
 9-18 µm) unue 8-opaj k laŭlarĝe 5-7-septaj, poste 4-opaj k murecaj. – Alĝerio  
 (Montaroj de Kabilio). Sur talo de *Ochrolechia tartarea*. – Pli afina al *Buellia* ol  
 al *Tryblidaria* – 1. **"*Polyschistes*" *mairei*** Wern.  
 2 Himenio J+ (blua). Askofruktoj (0,5-1 mm) ebendiskaj, maldike sed daŭre randaĵaj.  
 Sporoj (27-40 x 11-19 µm) 8-opaj, brunaj, unue laŭlarĝe 3-septaj, poste submur-  
 ecaj. – Portugalio. Sur talo de diversspeciaj krustecaj likenoj k sur apotecioj de  
*Rhizocarpon gr. geographicum* – 2. ***T. lusitanica*** (Nyl.) Vouaux  
 1 Sporoj  $\leq 22 \times 11$  µm, submurecaj.  
 22 Sporoj (ĉ. 18 x 8 µm) senkoloraj, oblongaj, 8-opaj, laŭlarĝe 5-septaj, laŭlonge 0-  
 2-septaj. Himenio J- aŭ preskaŭ. Askofruktoj (0,2-0,5 mm) bluete nigraj, malbrilaj,

rondaj, konveksaj, senrandajaj. – S-Afriko (ĉirkaŭaĵo de Cape Town). Sur talo de *Buellia callaina* (Stitz.) Zahlbr. –

**3. *T. capensis*** (Stiz.) Zahlbr.

**2** Sporoj brunaj, 8-opaj.

**333** Sporoj (13-20 x 9-11  $\mu\text{m}$ ) laŭlarĝe 3-, laŭlonge ofte 1-3-septaj. – Parazita al talo de divers-speciaj *Caloplaca* k *Xanthoria* –

→ ***Buellia*** (3. *B. nivalis*)

**33** Sporoj (11-19 x 5-8  $\mu\text{m}$ ) laŭlarĝe 3(5)-, laŭlonge tre malofte 1-septaj.

**44** Sen videbla talo. – Sur talo k apotecioj de *Ochrolechia* –

→ ***Buellia*** (6. *Dactylospora glaucomariooides*)

**4** Kun talo J+ (indiga), finevolue fendet-areola. – Ĉe talo de *Lecanora albescens* –

→ ***Buellia*** (10. *Buellia lecanorae*)

**3** Sporoj laŭlarĝe 5-7-septaj. – Sur talo de *Brigantiaeae fuscolutea* –

→ ***Buellia*** (4. *Dactylospora frigida*)

### *Unguiculariopsis* Rehm → *Skyttea*

### *Weddellomyces* D. Hawksw.

Nur unu specio : Askofruktoj (0,1-0,4 mm) 1-3-opaj, ± enprofundaj en la talo de *Caloplaca aurantia* aŭ de *C. flavescens*. Askoj (95-135 x 15-20  $\mu\text{m}$ ) subcilindraj. Sporoj (24-30 x 8-11  $\mu\text{m}$ ) 8-opaj, ore brunaj. – Britio (Anglio k Kimrio) k Francio (apud Poitiers). – Sin. *Phaeospora epicallipisma* (Wedd.) Arnold, *W. "epicallipismum"* –

***W. epicallipisma*** (Wedd.) D. Hawksw.

### *Wentiomycetes* Koord.



**11** Sur talo de folioloĝaj likenoj en E-Afriko (Ugando). Askofruktaj haroj kun fino furka –

**1. *W. lichenicola*** (Hansf.) D. Hawksw.

**2.** **1** Sur putrantaj taloj de *Peltigera leucophlebia* en Eŭropo. Askofruktaj haroj simplaj. Askofruktoj (0,1 mm) almetaj sur la talo de la likeno, disaj sur micelio parte ĉesupraja, malhele bruna. – Sin. *Dimeriella lichenicola* Hansf. –

**2. *W. peltigericola*** D. Hawksw.

## ***Basidiomycotina***

Multaj *Basidiomycotina* (ekz. pluraj *Corticaceae*) povas laŭkaze saprofite kreski sur likenoj. Sed, ĝis nun, sâjne nur 7 specioj (kun bazidiosporoj senkoloraj), el kiuj nur 4 priskribitaj, devas esti rigardataj kiel vere likenloĝaj.

**11** Bazidiofruktoj (0,2-0,8 mm) kusenet- aŭ diskoformaj, humidastate gelateneceaj, sekastate kornecaj. Bazidioj laŭlonge septaj. ***Tremella*** Dill. ex Fr.

**22** Bazidiofruktoj brunaj aŭ nigraj. Bazidioj 1-septaj.

**33** Bazidioj 16-20 x 10-15 µm. Bazidiosporoj 10-18 x 8-14 µm. Hifoj sen anastomozaj ansoj. – Eŭropo. Tre ofta sur *Mycoblastus sterilis* –

***T. lichenicola*** Diederich

**3** Bazidioj 10-12 x 7-9 µm. Bazidiosporoj 6-8 x 4-5 µm. – Skotio. Sur *Cetraria chlorophylla* – ***T. cetrarilcola*** Diederich et Coppins ined.

**2** Bazidiofruktoj oranĝaj. Bazidioj (6-13 x 4-8 µm) 1-3-septaj. Bazidiosporoj 6-8 x 4-6 µm. Hifoj kun anastomozaj ansoj. – Borneo (Sarawak), Skotio k Luksemburgio. Sur *Platismatia* k *Evernia prunastri* – ***T. coppinsii*** Diederich et Marson

Rim. : Laŭ CHRISTIANSEN, ekzistas 3 aliaj likenloĝaj *Tremellales*, ankoraŭ ne priskribitaj, kun bazidiofruktoj malestaj :

– du specioj kun bazidioj interne de konveksaj misformajoj de la talo respektive de *Cladonia* k *Phaeophyscia* ;

– unu specio kun bazidioj interne de la himenio de *Rinodina*.

**1** Bazidiofruktoj pli grandaj, nek gelateneceaj nek kornecaj. Bazidioj senseptaj.

**22** Bazidiofruktoj maloftaj, konsistantaj el krusto ĝenerale je pluraj cm<sup>2</sup>, maldika, membraneca, blanka (iafoje flavete aŭ brunete), sursubstrate sterna, sufice adhera, ĉirkaŭita de talaj hifoj araneecaj, radiantaj. Fungo plejofte senfrukta, el ŝim-aspekto tegaĵo (1-100 cm longa) de araneecaj hifoj blanketaj. Iafoje kun multaj sklerotoj globaj aŭ lentoformaj (1-3 mm) – unue flavete blankaj k malgrataj, poste brunetaj k glataj –, sur la araneecaj partoj ("*Sclerotium lichenicola*" Swends.). Bazidiosporoj 5-12 x 2-7 µm. – Mezvarmaj regionoj ± humidaj de Eŭropo. Sur ŝelloĝaj algokolonioj k sur multaj likenspecioj, precipe *Lecanora conizaeoides*. – Sin. *Corticium centrifugum* auct., (?) *Fusisporium kuehnii* Fuck., (?) *Hypelia rosea* Pers. ex Fr., (?) *Hypoderma effusum* Fuck., (?) *Trichothecium roseum* (Pers. ex Fr.) Link ex Fr. – ***Athelia arachnoidea*** (Berk.) Jül.

**2** Bazidiofruktoj agarikecaj, ombreloformaj, kun "ĉapelo" (4-20 mm diametra) bruna k "piedo" aŭ stipo (10-30 x 0,7-2 mm) blanketa. Bazidiosporoj 7-11 x 4-6 µm. – Britio. Sur taloj de *Peltigera*. – Inkl. (?) *Clitocybe peltigerina* Peck., el U.S.A. –

***Omphalina cupulatoides*** Orton

## Coelomycetes

### Determinilo pri la genroj

**AAA** Piknidioj hel- aŭ viv-koloraj, escepte iafoge (*Verrucaster*) finevolue, ostiolaj. Konidioj senkoloraj.

**BB** Piknidioj lokiĝintaj sur globaj gajloj (1-3 mm) de la podecioj de diversspeciaj *Cladonia*. Konidioj 0-septaj.

**CC** Gajloj samkoloraj al la podecioj..... *Bachmanniomyces*

**C** Gajloj tre ruĝaj sed finevolue nigriĝantaj ..... *Verrucaster*

**B** Piknidioj ne lokiĝintaj sur gajloj.

**CC** Konidioj (6-12 x 1-3 µm) kornoformaj (limakoformaj), 0-septaj... *Cornutispora*

**C** Konidioj senkornaj.

**DD** Konidioj 0-septaj ..... *Libertiella*

**D** Konidioj maturstadi 1-septaj.

**EE** Konidioforoj ĉeestaj kvankam mallongaj, ĉebaze kelkebranĉaj. – Sur talo de *Peltigera* – ..... *Karsteniomyces*

**E** Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj samdimensiaj al sia konidio. – Sur ŝelloĝa talo senfrukta inter individuoj de *Lecanora saligna* – ..... *Pseudodiplodia*

**AA** Piknidioj nigraj aŭ ± malhele brunaj, senostiolaj.

**BB** Piknidioj (0,3-0,8 mm), tre elstaraj, subglobaj, malfermiĝintaj per ekvatora ŝirajo. Konidioforoj branĉaj aŭ ne. Konidioj longaj, faden- aŭ vermo-formaj, iafoge branĉaj, plurseptaj ..... *Pyrenotrichum*

**B** Piknidioj (0,03-0,1 mm) tute aŭ grandparte entalaj, subglobaj aŭ elipsoidaj, ĉesupre neregule k larĝe malfermiĝintaj. Konidioforoj malestaj. Konidioj mal-longaj, falĉiloformaj, 0-septaj..... *Selenophoma*

**A** Piknidioj nigraj aŭ ± malhele brunaj, ostiolaj.

**BB** Konidioj faden- aŭ vermo-formaj, septaj aŭ ne, 1-opaj. Piknidioj (0,1-0,2 mm) almenaŭ komencevolue enprofundaj en la talo de la likeno. Konidioforoj malestaj. ..... *Rhabdospora*

**B** Konidioj nek faden- nek vermo-formaj.

**CC** Konidioj (almenaŭ iuj) laŭlarĝe septaj.

**DD** Konidioj 3-septaj, 18-22 x 3-5 µm, ĉesepte ne maldikiĝintaj, senkoloraj, ŝpiniformaj, rektaj aŭ kurbetaj..... *Keissleriomyces*

**D** Konidioj 1(2)-septaj.

**EE** Konidioj senkoloraj.

**FF** Konidioj tre kurbaj, preskaŭ en formo de L aŭ de J ..... *Everniicola*

**F** Konidioj ne tre kurbaj (nek L- nek J-formaj).

**GG** Sur talo aŭ podecioj de *Cladonia*, sur kiuj ili ĝenerale estigas gajlojn..  
..... *Epicladonia*



Comutispora



Keissleriomyces



Everniicola

- G** Sur talo de aligenraj likenoj, sur kiuj ili ne estigas gajlojn. Konidioforoj malestaj.
- HH** Piknidioj preskaŭ tute enprofundaj en la talo de ne krustecaj likenoj..... *Diplodina*
- H** Piknidioj unue en talo krusteca, ŝelloĝa, senfrukta, ne determinata, poste ± elstaraj..... *Ascochyta*
- E** Konidioj brunaj, brunetaj, verdete brunaj aŭ nigretaj.
- FF** Konidioj 1-opaj, ĉebaze detranĉaj. Konidioforoj malestaj..... *Lichenodiplis*
- F** Konidioj ariĝintaj en katenetoj. Konidioforoj ĉeestaj.
- GG** Piknidioj (0,1-0,5 mm) en talo krusteca, surpetra, senfrukta, kiun ili ne modifas. – Fakte estas likeno – ..... *Nigropuncta*
- G** Piknidioj (< 0,1 mm) en nigra makulo elstara, ronda (1-2 mm), kiun ili estigas sur la talo de *Parmelia laevigata* ..... *Vouauxiella* (1. "V." *unisepata*)
- C** Konidioj 0-septaj.
- DD** Konidioj brunaj, brunetaj, verdete brunaj aŭ nigretaj.
- EE** Konidioforoj ĉeestaj, ĉebaze branĉaj. Konidioj ariĝintaj en katenetoj. Piknidioj kun ostiolo finevolue tre larĝe malferma k sekve ± kupuloformaj..... *Vouauxiella*
- E** Konidioforoj malestaj. Piknidioj kun ostiolo neregulforma, finevolue ofte larĝe malferma.
-  **FF** Konidiodonaj ĉeloj tute brunaj aŭ brunetaj. Konidioj glatsupraj, preskaŭ ĉiu ĉebaze detranĉaj ..... *Laeviomyces*
- F** Konidiodonaj ĉeloj proks. senkoloraj krom la ambaŭ finoj ofte brunaj. Konidioj ofte ± malglatsupraj, ĝenerale ne detranĉaj..... *Lichenoconium*
- D** Konidioj senkoloraj.
- EE** Piknidioj (0,05-0,2 mm) kun ostiolo cirkla, ĉirkaŭita de pluraj haroj (40-70 x 3-5 µm) brunaj, septaj..... *Pyrenopochaeta*
- E** Piknidioj senharaj.
- FF** Ostiolo ĉefine de beko rekta aŭ kurbeta..... *Sphaerconema*
- F** Ostiolo maks. apenaŭ elstara.
- GG** Piknidioj (0,03-0,05 mm) ± disaj sur la mazedio de diversspeciaj *Calicium*, globaj, ± elstaraj..... *Asterophoma*
- G** Piknidioj ne kreskantaj sur la mazedio de *Calicium*.
- HH** Estigantaj gajlojn.
- II** Ĉe talo k podocioj de *Cladonia* ..... *Epicladonia*
- I** En talo de *Parmelia perforata*..... *Phyllosticta*
- H** Ne estigantaj gajlojn.
- II** Sur talo de *Hypogymnia intestiniformis* ..... *Libertiella* (1. *L. obscurior*)
- I** Ĉe aliaj likenoj.
- JJJ** Konidioforoj bone distingeblaj, longaj, neregule branĉaj.
- KK** Ĉe talo k askofruktoj de krustecaj likenoj ŝelloĝaj. *Dendrophoma*
- K** Ĉe talo k podocioj de *Cladonia*..... *Lichenosticta*
- JJ** Konidioforoj ĝenerale malestaj, tre malofte ĉeestaj sed tiam tre mallongaj. Konidioj ĉebaze ofte detranĉaj. Ĉe talo k podocioj de *Cladonia*..... *Epicladonia*

J Konidioforoj malestaj. Ĉe alispeciaj likenoj.

KK Konidiodonaj ĉeloj  $10-22 \times 1-2 \mu\text{m}$ , kune kun longformaj sterilaj filamentoj sinuaj, branĉaj aŭ ne. Konidioj  $3-6 \times 1-2 \mu\text{m}$ . Piknidioj ( $0,1-0,2 \text{ mm}$ ) ..... *Lichenophoma*

K Konidiodonaj ĉeloj ne kune kun sterilaj filamentoj.

LL Konidioj ĉebaze detranĉaj ..... *Vouauxiomycetes*

L Konidioj ĉebaze ne detranĉaj.

MM Konidioj  $10-16 \times 3-4 \mu\text{m}$ . Ĉe talo de *Usnea filipendula* ..... *Pseudoseptoria*

M Konidioj  $1-7 \times 1-4 \mu\text{m}$ .

NNN Sur talo de *Caliciaceae*. Konidioj  $2-4 \times 1-2 \mu\text{m}$  ..... *Microcalicium*

NN Ĉe askofruktoj de *Chrysotrichia chrysophthalma*. Konidioj  $2-4 \times 1-2 \mu\text{m}$  ..... *Minutophoma*

N Ĉe talo kaŭ askofruktoj de aliaj likenspecioj. Konidioj  $1-3 \times 1-2 \mu\text{m}$  ..... *Phoma*

## Determinilo pri la specioj

### *Ascochyta* Lib.

Proks. 350 specioj, el kiuj nur unu likenloĝa : Piknidioj izolaj aŭ grupete ariĝintaj, en ŝelloĝa talo senfrukta, ne determinata. Konidiodonaj ĉeloj ( $4-8 \times 2-3 \mu\text{m}$ ) ĉesupre maldikiĝintaj. Konidioj  $8-10 \times 3-4 \mu\text{m}$ . – Anglio. – Sin. *Diplodina lichenoides* A. L. Sm. – *A. lichenoides* (A. L. Sm.) D. Hawksw.

### *Asterophoma* D. Hawksw.

Nur unu likenloĝa specio priskriftita, kiu ŝajne (kiel aliaj *Asterophoma*) estas anamorfo de iu *Chaenothecopsis* (TIBELL, parolo) : Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj ( $5-7 \times 2-4 \mu\text{m}$ ) senkoloraj. Konidioj ( $1-4 \times 1 \mu\text{m}$ ) subcilindraj, ± kungluaj pro mucilago. – Eŭropo, U.S.A. k Afriko (Ruando) – *A. mazaediicola* D. Hawksw.

### *Bachmanniomycetes* D. Hawksw.

Nur unu specio : Piknidioj ( $0,1-0,2 \text{ mm}$ ) unue oranĝaj, poste brunetaj, tute interne de gajloj de la podescioj de *Cladonia* gr. *uncialis*, kun ostiolo finevolue larĝe malferma. Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj ĉesupre maldikiĝintaj, ĉebaze  $7-12 \times 3-4 \mu\text{m}$ . Konidioj ( $7-11 \times 4-6 \mu\text{m}$ ) ofte pintaj ĉe unu fino, naskiĝantaj izole sed poste ariĝantaj en grandaj amasoj. – U-Eŭropo, Skandinavio k Kanado. – *Phyllosticta uncialicola* Zopf – *B. uncialicola* (Zopf) D. Hawksw.

### *Cornutispora* Piroz.

Du specioj, el kiuj nur unu likenloĝa : Piknidioj ( $0,05-0,1 \text{ mm}$ ) blanketaj aŭ brunetaj, disaj en senkolorigitaj makuloj ( $1-2 \text{ mm}$ ) ĉirkaŭitaj de nigra linio, de la talo de foliecaj

likenoj k de *Rhizoplaca chrysoleuca*. Konidioforoj tre videblaj, branĉaj. Konidioj 6-12 x 1-2 µm. – Eŭropo –

**C. ilchenicola** D. Hawksw. et B. Sutt.

### **Dendrophoma** Sacc.

Nur unu likenloĝa specio necerte valora : Piknidioj disaj sed multetaj. Konidioj (3-5 x 1-2 µm) ovoidaj. – Francio –

**D. lecanorae** Vouaux

### **Diplodina** Westend.

Du likenloĝaj specioj dube valoraj.

- 11 Piknidioj (0,1-0,2 mm) disaj, grandparte enprofundaj en la talo de nedeterminata *Cladonia*. Konidiodonaj ĉeloj ĉesupre dikigintaj. Konidioj (10-13 x 3-4 µm) plejmulte malklare 1-septaj (septo bone videbla nur post ago de J). – E-Francio (Vogezoj) – 1. **"D." claudelli** Vouaux
- 1 Piknidioj ( $\leq$  0,1 mm) grupe ariĝintaj, preskaŭ tute enprofundaj en blankaj makuloj klarlimaj de la talo de *Peltigera*. Konidiodonaj ĉeloj ĉesupre maldikigintaj. Konidioj (10-14 x 3-4 µm) preskaŭ ĉiuj klare 1-septaj. – Francio, Luksemburgio k Svedio – 2. **"D." peltigerae** Vouaux

### **Epicladonia** D. Hawksw.

11 Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj ĉesupre dikigintaj (14-20 µm longaj; ĉesupre 3 µm dikaj). Konidioj (10-13 x 3-4 µm) ĉebaze detranĉaj, plejmulte malklare 1-septaj (septo bone videbla nur post ago de J). Piknidioj (0,1-0,2 mm) grandparte enprofundaj en la talo de nedeterminata *Cladonia*, ne estigantaj gajlojn.  
→ **Diplodina** (1. "D". *claudelli*)

- 1 Konidioforoj ĝenerale malestaj. Konidiodonaj ĉeloj ĉesupre maldikigintaj.
- 222 Piknidioj (0,1-0,2 mm) ± elstaraj, ĝenerale sur malgrandaj gajloj globaj (plejmulte  $\leq$  1 mm) sed iafoge senpere sur la talo aŭ la podecoj de *Cladonia bacciformis*. Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj 7-15 µm longaj; ĉebaze 2-4 µm dikaj. Konidioj (8-12 x 2-4 µm) ĉiuj 0-septaj, ĉebaze detranĉaj aŭ ne. – Finnio – 1. **E. simplex** D. Hawksw.
- 222 Piknidioj (plejmulte  $\leq$  0,1 mm) tre fruevolue elstaraj sur gajloj – globaj (1-5 mm), papiloformaj aŭ branĉaj – de la talo aŭ podecoj de diversspeciaj *Cladonia*. Konidioforoj mallongaj, branĉaj aŭ ne, aŭ malestaj. Konidiodonaj ĉeloj 10-20 µm longaj; ĉebaze 3-4 µm dikaj. Konidioj (7-14 x 2-4 µm) preskaŭ ĉiuj 1-septaj, ĉebaze detranĉaj. – Eŭropo. – Sin. *Diplodina sandstedei* Zopf – 2. **E. sandstedei** (Zopf) D. Hawksw.

- 2 Piknidioj (plejmulte  $\leq$  0,1 mm) disaj, daŭre enprofundaj en la talo de diversspeciaj *Cladonia*, iafoge senkolorigantaj ĝin sed neniam estigantaj gajlojn. Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj 7-12 µm longaj, ĉebaze 3-4 µm dikaj. Konidioj 7-11 x 3-4 µm, 0(1)-septaj, ĉebaze plejofte detranĉaj. – Aŭstrio, E-Francio, Skotio. – Sin. *Aposphaeria stenospora* Harm. – 3. **E. stenospora** (Harm.) D. Hawksw.

### **Everniicola** D. Hawksw.

Nur unu specio : Piknidioj (0,02-0,04 mm) mikroskopaj, multaj sed ne kuniĝintaj en brunetaj makuloj klarlimaj de la talo de *Evernia prunastri*. Konidioforoj malestaj. Konidioj

## Coelomycetes

Everniicola ĝis Libertiella 1-3

diodonaj ĉeloj subglobaj (2-5 µm). Konidioj (8-12 x 1-2 µm) 1(2)-septaj. – Britio  
(Kimrio = Wales) –

*E. flexispora* D. Hawksw.

## Karsteniomyces D. Hawksw.

Nur unu specio : Piknidioj (0,1-0,3 mm) elstaraj, unue helege oranĝaj, poste brike ruĝaj, multaj sed ne arigintaj, kun ostiolo larĝe k neregule malferma. Konidioj (12-24 x 3-6 µm) subspinaliformaj, ofte kurbetaj. – Finnio Skandinavio k Germanio. – Sin. *Stagonopsis peltigerae* P. Karst. –

*K. peltigerae* (P. Karst.) D. Hawksw.

## Keissleriomyces D. Hawksw.

Nur unu specio : Piknidioj (< 0,1 mm) disaj, unue en la podocoj de *Cladonia furcata*, poste ete elstaraj. Konidioforoj malestaj. Kondiodonaj ĉeloj (5-8 x 5-6 µm) ampoloformaj aŭ subglobaj. – Bohemio (Riesengebirge). – Sin. *Stagonopsis sandstedeana* Keissl. –

*K. sandstedeana* (Keissl.) D. Hawksw.

## Laeviomyces D. Hawksw.

Du specioj, ambaŭ likenloĝaj.

11 Piknidioj (0,04-0,06 mm) 1-ope enprofundaj en la talo aŭ la lireloj de certaj *Opegrapha*, kun ostiolo larĝe k neregule malferma. Konidiodonaj ĉeloj (4-9 x 1-3 µm) verdete brunaj (ofte helege). Konidioj (3-5 x 1-2 µm) verdete brunaj. – Skotio –

*1. L. opegraphae* D. Hawksw.

1 Piknidioj (0,1-0,3 mm) disaj aŭ ± arigintaj, unue enprofundaj en la talo de ŝelloĝaj *Pertusaria*, pli malofte de *Buellia disciformis*, poste ± elstaraj. Konidiodonaj ĉeloj (3-10 x 2-3 µm) hele brunaj. Konidioj (3-6 x 2-4 µm) helete brunaj. – Eŭropo k N-Ameriko. – Sin. *Coniothyrium lichenicola v. buelliae* Keissl., *Coniothecium pertusariicola* Nyl., *Spilomium leioplacae* Oliv. – *2. L. pertusariicola* (Nyl.) D. Hawksw.

## Libertiella Speg. et Roum.

Tri specioj, el kiuj du verŝajne dube valoraj.

11 Piknidioj (0,1-0,2 mm) brunaj, ĉebaze pli malhelkoloraj, multaj, enprofundaj en la talo de *Hypogymnia intestiniformis*. Konidioforoj ne menciiĝas far GÉRBER. Konidioj (2-4 x 1-2 µm) bone diferencaj de tiuj de la likeno (5-7 x 1 µm). – Specio tamen necerte valorata, ĉar la tipo malaperis k neniu aŭtentika specimeno estas konata. – Aŭstrio (Hohe Tauern) –

*1. L. obscurior* Gerber

1 Piknidioj flavete blankaj ĝis hele oranĝaj.

22 Piknidioj (0,1-0,3 mm) flavete blankaj aŭ helege oranĝaj, ĉirkaŭostiole malhele ruĝbrunaj, kun ostiolo larĝe malferma (tial piknidioj sekastate apotecioformaj), tre elstaraj, ĉebaze ete lanugaj, arigintaj sur malnovaj taloj de *Peltigera*. Konidioforoj branĉaj. Konidioj (5-8 x 2-4 µm) arigintaj en gelateneca amaso blanka. – Eŭropo. – Sin. *Zyphia peltigerae* Lib. ex Cooke nom. illeg. –

*2. L. malmedyensis* Speg. et Roum.

2 Piknidioj (0,4-0,5 mm) helege oranĝflavaj, kun ostiolo tre malgranda, senharaj, disaj aŭ arigintaj, almetaj sur talo de *Xanthoria*. Konidioforoj ne priskribitaj. Konidioj globaj (2-3 µm). – Duba specio, ĉar la piknidioj verŝajne apartenas al *Xanthoria*. – Svedio –

*3. L. xanthoriae* Keissl.

***Lichenoconium* Petr. et Syd.**

11 Piknidioj (0,1-0,2 mm) unue preskaŭ tute enprofundaj en la likeno, finevolue ± elstaraj k preskaŭ kupuloformaj pro larĝe malferma ostiolo.

22 Konidioj (2-6 µm) subglobaj, preskaŭ glatsupraj. Konidiodonaj ĉeloj 5-11 x 2-4 µm. – Ne-mediteranea Eŭropo. Sur talo k askofruktoj de multaj foliecaj likenspecioj –

**1. *L. xanthorae* M. S. Christ.**

2 Konidioj ± longformaj, ĉebaze iafoge distingeble detranĉaj, ± malglatsupraj.

333 Konidioj (2-4 x 2-3 µm) tre diversformaj. Konidiodonaj ĉeloj 5-11 x 1-3 µm. – Eŭropo. Sur podecioj, esceptokaze skvametoj, de diversspeciaj *Cladonia*, kiujn ĝi iafoge nigrigas. – Sin. *L. cladoniae* (Ellis et Everh.) Petr. et Syd. –

**2. *L. paxillatae* (Oudem.) Petr. et Syd.**

33 Konidioj (5-8 x 3-6 µm) plejmulte piroformaj. Konidiodonaj ĉeloj 7-12 x 2-4 µm. – Subkosmopolita. Sur talo aŭ apotecioj de diversspeciaj *Parmelia*, *Ramalina* k *Usnea*. – Sin. *Coniothyrium ramalinae* Vouaux –

**3. *L. carginatum* (Linds.) D. Hawksw.**

3 Konidioj (4-9 x 3-6 µm) tre diversformaj. Konidiodonaj ĉeloj 6-14 x 2-4 µm. – Finnio, Germanio k Luksemburgio. Sur talo k apotecioj de *Physcia aipolia* k *P. tenella*. –

**4. *L. lichenicola* (P. Karst.) Petr. et Syd.**

1 Piknidioj ≤ 0,1 mm.

22 Konidioj (2-6 µm) subglobaj.

33 Konidiodonaj ĉeloj 5-11 x 2-4 µm. Konidioj (2-5 µm) preskaŭ glatsupraj. Piknidioj unue ± enprofundaj en la likeno, poste ± elstaraj. – Eŭropo, Kanarioj k N-Ameriko. Sur talo aŭ askofruktoj de multaj likenspecioj. – Sin. *Coniothyrium imbricariae* Allesch., *Coniothyrium lecanoraceum* Vouaux, *Epicoccum usneae* Anzi –

**5. *L. usneae* (Anzi) D. Hawksw.**

3 Konidiodonaj ĉeloj maks. 8 µm longaj. Konidioj ± malglatsupraj. Piknidioj tute enprofundaj en la likeno krom la supro finevolue iom elstara. – Eŭropo k U.S.A.. Ĉe talo aŭ askofruktoj de multaj likenspecioj –

44 Konidiodonaj ĉeloj 4-8 x 2-4 µm. Konidioj 2-6 µm. – Sin. *Coniosporium lecanorae* Jaap, *Lichenoconium lecanoraceum* sensu Petr. et Syd., *Lichenoconium parasiticum* D. Hawksw. –

**6. *L. lecanorae* (Jaap) D. Hawksw.**

4 Konidiodonaj ĉeloj 3-6 x 2-4 µm. Konidioj 2-4 µm.

**7. *L. erodens* M. S. Christ. et D. Hawksw.**

2 Konidioj ± longformaj, ĉebaze iafoge ± distingeble detranĉaj.

33 Konidioj 4-6 x 2-4 µm. Konidiodonaj ĉeloj 7-11 x 2-3 µm. – Aŭstralio. Sur talo de *Heterodermia muelleri* (Hampe) Nyl., kie ĝi estigas brunetajn makulojn –

**8. *L. echinosporum* D. Hawksw.**

3 Konidioj 6-11 x 3-7 µm. Konidiodonaj ĉeloj 5-10 x 3-4 µm. – Luksemburgio. Sur talo de *Ramalina fraxinea* –

**9. *L. reichlingii* Diederich**

***Lichenodiplis* Dyko et D. Hawksw.**

Du specioj, ambaŭ likenloĝaj.

11 Konidioj (4-8 x 2-3 µm) hele brunaj. Piknidioj (0,1 mm) disaj, unue ± enprofundaj en la likeno, poste ± elstaraj. Konidiodonaj ĉeloj 5-12 x 2-3 µm. – Eŭropo, Maroko k Kanarioj. Sur talo k askofruktoj de multaj likenspecioj. – Sin. *Microdiplosdia leca-*



*noraе* Vouaux in B. de Lesd., *M. effusae* Vouaux in Keissl., *M. ferruginea* Vouaux, *Sclerococcum lecanorae* Vouaux, *Diplodina vouauxii* B. de Lesd. ex Vouaux –

1. *L. lecanorae* (Vouaux in B. de Lesd.) Dyko et D. Hawksw.

- 1 Konidioj (9-15 x 4-5 µm) brunaj. Piknidioj similaj al tiuj de 1. *L. lecanorae* sed pli malgrandaj. Konidiodonaj ĉeloj 8-17 x 2-3 µm. – Norvegio. Sur apotecioj de *Rinodina septentrionalis*. – Verŝajne identa al *Microdiplodia lichenicola* Vouaux, konata per nur unu specimeno, nun malaperinta, kolektita far abato FAURIE en insulo Sahalino, sur *Caloplaca* sp. –

2. *L. lichenicola* Dyko et D. Hawksw.

### *Lichenophoma* Keissl.

Du specioj dubaj.

- 11 Piknidioj unue enprofundaj en la talo (pulvoreca) de *Loxospora elatinum*, poste ± elstaraj. Sterilaj hifoj sinuaj, branĉaj, nek septaj nek interanastomozaj. – Aŭstrio k Francio –

1. *L. haematommatis* Keissl.

- 1 Piknidioj daŭre enprofundaj en la talo de diversspeciaj *Opegrapha*, al kiuj ili eble apartenas. Sterilaj hifoj lokloke septaj, interanastomozaj en neregula reto. – N-Francio –

2. *L. opegraphae* Vouaux

### *Lichenosticta* Zopf

Nur unu likenloĝa specio, kiu (kiel kelkaj specioj de nelikenloĝaj *Lichenosticta*) ŝajne estas anamorfo de *Chaenothecopsis* (laŭ TIBELL, ne publikigita) : Piknidioj tre multaj sed ne arigintaj, unue en la podecjo k la talo de diversspeciaj *Cladonia*, poste 1/2 elstaraj. Konidioj (6-11 x 2-6 µm) larmoformaj, ofte kurbaj. – Eŭropo. – Sin. *Dendrophoma alcicornaria* (Linds.) Vouaux, *L. "alcicornaria"* –

*L. alcicornaria* (Linds.) D. Hawksw.

### *Microcalicium* Vain.

(Anamorfoj)

Piknidioj < 0,1 mm, ± elstaraj, subglobaj. Konidioforoj malestaj.

- 11 Konidioj (0,2-0,3 mm) subglobaj. Konidiodonaj ĉeloj (6-9 x 2-3 µm) subcilindraj. – Eŭropo k N-Ameriko. – Sin. *M. subpedicellatum* (Schaer.) Tibell

1. *M. disseminatum* (Ach.) Vain.

- 1 Konidioj (2-4 x 1-2 µm) elipsoidaj. Konidiodonaj ĉeloj (3-6 x 1-3 µm) subkonusaj. – S-Ameriko k Aŭstralio –

2. *M. conversum* Tibell

### *Minutophoma* D. Hawksw.

Nur unu specio : Piknidioj mikroskopaj (20-40 µm), tamen bone videblaj pro supra parto nigra, disaj, ± globaj, 1/2 enprofundaj en la apotecioj de *Chrysotrichia chrysophthalma*, ci tiuj ne misiformitaj k normale sporodonaj. Suba parto de piknidioj konsistanta nur el konidiodonaj ĉeloj (3-6 x 2-4 µm) ampoloformaj. Konidioj (2-4 x 1-2 µm) subcilindraj aŭ elipsoidaj, izolaj, ne kungluaj pro mucilago. – Skotio –

*M. chrysophthalmae* D. Hawksw.

**Nigropuncta** Petr. et Syd.

Nur unu specio : Piknidioj disaj, kun ostolo finevolue tre larĝe malferma, tial ± kupuloformaj. Konidioforoj tre densaj, sen- aŭ malmulte-branĉaj. Konidioj globaj (6-8 µm) 0-1-septaj, tre malhekkoloraj k granul-supraj. – Aŭstrlo. Laŭ HAWKSWORTH k POELT (1986) likenloĝinta, kun *N. rugulosa* D. Hawksw.

**Phoma** Sacc.

Konidioj izolaj, abundaj, ne kunigitaj de mucilago. Proks. 50 specioj, el kiuj 13 likenloĝaj; el tiuj ĉi, HAWKSWORTH (1981) konservas nur 5.

**11** Konidioj (5 x 1 µm) tre maldikaj, bastonetformaj. Piknidioj ± elstaraj aŭ ± ensubstrataj. – Duba specio. Eble nur piknidioj de la likeno. – Eŭropo. Ĉe talo de *Physconia distorta* –

**1. *P. lichenis*** Pass.

**1** Konidioj nek tre maldikaj nek bastonetformaj.

**22** Piknidioj lokiĝintaj en senkolorigitaj makuloj de la talo de la likeno.

**33** Piknidioj (0,04-0,08 mm) disaj aŭ ariĝintaj, enprofundaj en makuloj ĉirkaŭitaj de malhele bruna linio, de la talo de diversspeciaj *Parmelia*. Konidiodonaj ĉeloj 2-3 x 1-2 µm. Konidioj (5-7 x 1-2 µm) elipsoidaj, longformaj aŭ iom renoformaj. – Eŭropo. – Sin. *Phyllosticta cytospora* Vouaux –

**2. *P. cytospora*** (Vouaux) D. Hawksw.

**3** Piknidioj (0,1-0,2 mm) disaj, unue enprofundaj en, poste ± elstaraj sur, makuloj ne ĉirkaŭitaj de bruna linio, de la talo de diversspeciaj *Peltigera* k eble ankaŭ de *Platismatia glauca*. Konidiodonaj ĉeloj neregule subglobaj (4-6 µm). Konidioj (4-7 x 2-5 µm) subcilindraj aŭ longe elipsoidaj. – Eŭropo. – Sin. *Phyllosticta peltigerae* P. Karst. –

**3. *P. peltigerae*** (P. Karst.) D. Hawksw.

**2** Piknidioj ne lokiĝintaj en senkolorigitaj makuloj de la talo de la likeno.

**33** Piknidioj mikroskopaj (0,02-0,06 mm), disaj au grupete ariĝintaj.

**44** Piknidioj enprofundaj en la himonio de la likeno, senkoloraj krom la supro bruneta. Konidiodonaj ĉeloj (4-8 x 3-5 µm) ampoloformaj. Konidioj (3-4 x 1-2 µm) elipsoidaj. – Novzelando. Ĉe *Usnea cf. florida* –

**4. *P. dubia*** (Linds.) Sacc. et Trott.

**4** Piknidioj unue enprofundaj en la talo de la likeno, poste ± elstaraj, malhele verdaj. Konidiodonaj ĉeloj 4-5 x 3-4 µm. Konidioj (3-5 x 1-2 µm) elipsoidaj aŭ subcilindraj. – Luksemburgio k Skotio. Ĉe *Lecanora expallens* k *Parmelia* (s.g. *Parmotrema*) –

**5. *P. lecanorina*** Diederich

Rim. : "P. lecanorae" Vouaux in B. de Lesd., kun piknidioj (0,1-0,2 mm), ĉiam ± ensubstrataj, konidioj (3-7 x 1-3 µm) pli grandaj k konidioforoj (9-15 x 1-2 µm) septaj, fakte respondas al la piknidioj de *Opegrapha lithyrga* k de aliaj likenspecioj.

**3** Piknidioj ≥ 0,1 mm.

**444** Ĉe talo de foliecaj likenoj. – Malbone konataj specioj, necerte valoraj, kies holotipo malaperis –

**555** Ĉe *Peltigera*. Piknidioj (0,1 mm) multaj sed ne ariĝintaj, unue enprofundaj en la talo de la likeno sed fruevolue sufice elstaraj. Konidiodonaj ĉeloj (6-10 x 1-2 µm) iom sinuaj, 0- aŭ 1-septaj. Konidioj (3-5 x 2-3 µm) neregule elipsoidaj aŭ renoformaj. – Dalmatio – **6. *P. epiparmelia*** Vouaux

55 Ĉe *Parmelia caperata*. Piknidioj (0,1-0,2 mm) elstaraj. Konidiodonaj ĉeloj 3-4 x 2 µm. Konidioj 3-6 x 2-3 µm. – Francio –

7. *P. caperatae* Vouaux in B. de Lesd.

5 Ĉe *Phaeophyscia orbicularis* k *Xanthoria parietina*. Piknidioj (0,1 mm) enprofundaj en la talo de la likeno, multetaj sed ne densaj. Konidiodonaj ĉelojmallongaj. Konidioj (4-6 x 2-3 µm) elipsoidaj. – N-Francio –

8. *P. epiphyscia* Vouaux

44 Ĉe apotecioj de *Physcia aipolia* k *Physconia distorta*. Piknidioj (0,1-0,2 mm) unue enprofundaj en la himenio de la likeno, poste ± elstaraj, disaj aŭ grupete ariĝintaj. Konidiodonaj ĉeloj globaj (4-7 µm). Konidioj (4-6 x 2-4 µm) elips- aŭ ovoidaj. – Aŭstrio k Svedio –

9. *P. physcicola* Keissl.

4 Ĉe talo aŭ askofruktoj de krustecaj likenoj.

55 Konidioj (4-7 µm) globaj. Piknidioj (0,1 mm) disaj, unue enprofundaj en la himenio de *Caloplaca cerina*, poste ete elstaraj. Konidiodonaj ĉeloj subglobaj (5-6 µm). – Centra Siberio, Ĉehoslovakio k Francio –

10. *P. caloplacae* D. Hawksw.

5 Konidioj ≤ 3 µm laŭ la plej granda dimensio. Konidiodonaj ĉeloj longformaj. Piknidioj (0,1 mm) disaj, 1/2 elstaraj. – Dubaj specioj, kies holotipo malaperis –

66 Konidioj globaj (1-2 µm). Konidiodonaj ĉeloj (5-12 x 1-2 µm), ĉebaze branĉaj, senseptaj. – N-Francio. Sur talo de *Anisomeridium biforme* kreskanta sur *Salix alba* –

11. *P. biformis* Vouaux

6 Konidioj (1-3 x 1-2 µm) elipsoidaj. Konidiodonaj ĉeloj (5-10 x 1-2 µm) senbranĉaj k 0-septaj aŭ, malofte, ĉebaze forkaj k 1-septaj. – Francio. Sur talo de diversspeciaj krustecaj likenoj –

12. *P. glaucellae* Vouaux

### *Phyllosticta* Pers. ex Fr.

Nur unu likenloĝa specio verŝajne ne apartenanta al la genro : Piknidioj (0,1 mm) diversope enprofundaj en gajloj (0,2-1,5 mm) duonglobaj de la talo de *Parmelia perforata* Tayl. Konidioforoj maldikaj, sinuaj, senbranĉaj, kun po 1 konidio (1-4 x 1-2 µm). – S-Hindio –

"*P.*" *galligena* F. Moreau

### *Pseudodiplodia* (P. Karst.) Sacc.

Nur unu likenloĝa specio cetere duba, ĉar la piknidioj verŝajne apartenas al la likeno (senfrukta, ŝelloĝa).

Piknidioj helege oranĝflavaj, disaj, apenaŭ enprofundaj en la talo de la likeno. Konidioj (7-9 x 2-3 µm) ĉiu kurbaj, kun septo nek meza nek tre videbla. – N-Francio, apud Dunkerko –

*P. lichenis* Vouaux in B. de Lesd.

### *Pseudoseptoria* Speg.

5 specioj el kiuj nur 1 likenloĝa : Piknidioj (0,1-0,2 mm) disaj, unue enprofundaj en la talo de *Usnea filipendula*, poste ± elstaraj. Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj 6-12 x 3-5 µm. Konidioj (10-16 x 3-4 µm) ĉebaze detranĉaj. – N-Hispanio k -Italio. – Sin. *Phoma usneae* Vouaux –

*P. usneae* (Vouaux) D. Hawksw.

***Pyrenophaeta* De Not.**

Nur du likenloĝaj specioj, el kiuj unu, kies holotipo malaperis, verŝajne ne apartenas al la genro.

11 Piknidioj (0,1-0,2 mm) disaj, elstaraj, sur la talo de *Collema tenax*. Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj (6-7 x 1-2 µm) subcilindraj. Konidioj 5-6 x 2 µm. – N. Francio (Bray-Dunes) – "P." *collematis* Vouaux in B. de Lesd.

1 Piknidioj (0,05-0,1 mm) unue enprofundaj en la talo de *Xanthoria parietina*, poste almetaj. Konidioforoj (4-18 x 1-2 µm) fadenformaj, plurseptaj, senkoloraj. Konidiadona ĉelo nur el unu tre mallonga branĉo tuj sub la septoj de la konidioforo. Konidioj (3-4 x 1-2 µm) elipsoidaj. – Luksemburgio – 2. *P. xanthoriae* Diédérich ined.

***Pyrenotrichum* Mont.**

R. SANTESSON (1952) distingas 9 speciojn de *Pyrenotrichum* (pri kiuj li donas informojn tre nekompletajn), ĉiuj parasimbiozaj al multaj likenspecioj tropikaj, ĉefe surfoliaj. Laŭ HAFELLNER, perletere, du el ili (7. *P. splitbergeri* k 8. *P. staurosorum*) estas fakte piknidioj de *Ectolechiaceae*.

11 Konidioj laŭlărge 0- aŭ 1-septaj.

22 Konidioj elipsoidaj – Ĉe *Lopadium* –

33 Ĉe *L. flammeum* Müll. Arg..

1. *P. bicolor* R. Sant. nom. nud.

33 Ĉe *L. tayabasense* (Vain.) Zahlbr..

2. *P. mirum* R. Sant. nom. nud.

3 Ĉe alispecia *Lopodium* ankoraŭ ne determinata.

3. *P. atrocyaneum* R. Sant. nom. nud.

2 Konidioj ± piro-, klabo- aŭ najlo-formaj. Ĉe *Sporopodium*.

33 Ĉe *S. leprieurii* Mont., *S. phyllocharis* (Mont.) Massal., *S. xantholeucum* (Müll. Arg.) Zahlbr., *S. argillaceum* (Müll. Arg.) Zahlbr..

4. *P. Irregularare* R. Sant. nom. nud.

3 Ĉe alispecia *Sporopodium* ankoraŭ ne determinata.

5. *P. podosphaera* R. Sant. nom. nud.

1 Konidioj laŭlărge plurseptaj, tre longformaj.

22 Konidioj sénbranĉaj. Ĉe *Lopodium*.

33 Ĉe *L. vermiculiferum* (Vain.) Zahlbr. k *L. sophodinum* (Nyl.) Zahlbr..

6. *P. filiforme* R. Sant. nom. nud.

3 Ĉe pluraj alispecioj *Lopodium*. Konidioj (55-80 x 2-3 µm) ± kurbaj, ofte vermoformaj, 5-7-septaj.

7. *P. splitgerberi* Mont.

2 Konidioj branĉaj.

33 Ĉe *Lasioloma*. Konidioj (60-85 x 2-4 µm) kun 2-4 finbranĉoj iom pli mal-longaj ol la konidioresto, rektaj aŭ kurbataj, multe septataj.

8. *P. staurosorum* (Keissl.) R. Sant.

3 Ĉe *Bacidia*.

9. *P. follicola* (Vain.) R. Sant.

***Rhabdospora* (Dur. et Mont.) Sacc.**

Ĉiu likenloĝaj specioj estas senvaloraj, dubaj aŭ fakte apartenas al alia genro. El la tri specioj menciiitaj far VOUAUX :

**R. lecanorae** Vouaux in B. de Lesd., kun konidioj (20-28 x 2 µm) 0-septaj, respondas al piknidioj de *Lecanora pulicaris*.

**R. thallicola** F. Tassi, kun konidioj (35-40 x 1-2 µm) 0-septaj, estas fakte piknidioj de *Lecanora* gr. *argentata*.

**R. leisdainii** Vouaux, kun konidioj (38-60 x 3-5 µm) unue 0-, poste ± distingeble 3-7-septaj, k piknidioj (0,1-0,2 mm) disaj, unue enprofundaj en la talo de *Lecidella elaeochroma*, poste elstaraj, el N-Francio (Malo-les-Bains), estas duba specio, kies tipo malaperis.

Kvara specio, ne mencita far VOUAUX, *R. antarctica* Speg. fakte identas al *Polyccum rugulosarium*.

### Selenophoma Maire

Nur unu likenloĝa specio, ankoraŭ ne finstudita : Konidiodonaj ĉeloj (5-8 x 2-5 µm) ampoloformaj ĝis elipsoidaj. Konidioj (5-7 x 2-3 µm) senkoloraj, 0-septaj, kurbij (falčiloformaj), glatsupraj. – Luksemburgio. En apotecioj (himenio k tala randajo) de *Lecanora persimilis* (Th. Fr.) Nyl. – **S. sp.**

### Sphaeronema Fr.

Nur unu likenloĝa specio, duba ĉar la piknidioj eble apartenas al la likeno(j) : Piknidioj arigintaj, 1/2 enprofundaj en la talo de ŝelloĝaj likenoj sur trunko de *Chamaerops humilis*. Konidioj 5-6 x 2-3 µm. – Alĝerio (monto Bouzareah) –

**S. lichenophilum** Dur. et Mont.

### Verrucaster Tobl.

Nur unu specio, kies afinoj estas necertaj : Piknidioj elstaraj sur gajloj de la podocejo de *Cladonia bacilliformis*, ± samkoloraj al la gajloj, kun ostiolo neregule stelforma. Konidioforoj branĉaj. Konidioj (8-9 x 1-2 µm) daŭre izolaj. – N-Germanio –

**V. lichenicola** Tobl.

### Vouauxiella Petr. et Syd.

 11 Konidioj (10-17 x 5-8 µm) preskaŭ ĉiuj 1-septaj, nigre brunaj, ĝenerale ne detranĉaj. Piknidioj 40-70 µm. – Skotio. Sur elstaraj nigraj makuloj de la talo de *Parmelia laevigata* – 1. **"V." uniseptata** D. Hawksw.

1 Konidioj 0-septaj, plejmulte detranĉaj ĉe unu aŭ ambaŭ finoj. Piknidioj 50-160 µm.

 22 Konidioj (6-9 x 3-5 µm) granulsupraj, dikparietaj, plejofte bareloformaj, malhelkoloraj, verde grizaj ĝis brunaj. Piknidioj multaj sed ne arigintaj, 3/4 enprofundaj en la talo aŭ la apotecioj de *Lecanora* gr. *argentata*. – U-Eŭropo k Pakistano – 2. **V. verrucosa** (Vouaux) Petr. et Syd.

2 Konidioj glatsupraj.

 33 Konidioj (5-9 x 3-4 µm) subcilindraj, elipsoidaj aŭ bareloformaj, verdete brunaj aŭ bluete verdaj. Piknidioj grupe arigintaj, preskaŭ tute enprofundaj en la talo aŭ la askofruktoj de multaj krustecaj k foliecaj likenoj. – Eŭropo, Maroko k N-Ameriko – 3. **V. lichenicola** (Linds.) Petr. et Syd.

- 3 Konidioj 2-6 x 1,5-2,5  $\mu\text{m}$ . – Brazilio (Rondonio). Sur talo de nedeterminataj folioloĝaj likenoj – **4. *V. pithospora*** (Cavalc. et Silva) B. Sutt.

***Vouauxiomycetes*** Dyko et D. Hawksw.

Anamorfoj (senaskofruktaj formoj) de *Abrothallus*. Konidioforoj malestaj. Konidiodonaj ĉeloj ampoloformaj. Tri priskribitaj specioj.

- 111** Konidioj (3-6 x 2-4  $\mu\text{m}$ ). Konidiodonaj ĉeloj 4-10 x 3-5  $\mu\text{m}$ . Pilknidioj < 0,1 mm, disaj aŭ arigintaj ĉe la apotecioj de diversspeciaj *Ramalina*, unue ensubstrataj, poste elstaraj. – Anamorfo de *Abrothallus suecicus*. – Eŭropo. – Sin. (?) *Spilomium ramalinae* Oliv., *Phoma ramalinae* Nordin –

**1. *V. ramalinae*** (Nordin) D. Hawksw.


- 11** Konidioj 6-8 x 4-5  $\mu\text{m}$ . Konidiodonaj ĉeloj 4-13 x 3-5  $\mu\text{m}$ . Pilknidioj (0,1-0,2 mm) 1/2 enprofundaj en la talo de diversspeciaj *Parmelia* sg. *Xanthoparmelia* (ĉefe *Parmelia caperata*). Anamorfo de *Abrothallus microspermus*. – Eŭropo. – Sin. *Phoma truncata* B. de Lesd. – **2. *V. truncatus*** (B. de Lesd.) Dyko et D. Hawksw.

- 1** Konidioj 7-12 x 5-8  $\mu\text{m}$ . Konidiodonaj ĉeloj 8-12 x 3-4  $\mu\text{m}$ . Pilknidioj (0,2-0,3 mm) elstaraj, dense arigintaj sur la talo de *Platismatia glauca*. Verŝajne anamorfo de *Abrothallus cetrariae*. Eble sinonima al *Phoma parmeliarium* (Oliv.) Vouaux – Svedio k Britaj insuloj – **3. *V. santessonii*** D. Hawksw.

## Hypomycetes

### Determinilo pri la genroj

- AA** Kun konidioj (neseke reproduktaj sporoj) naskitaj de konidiodonaj ĉeloj portataj aŭ ne de konidioforoj. (A, p. 112)
- BB** Konidioforoj ariĝintaj en konidiodona amaso (konidiofrukto aŭ sporodoño) ofte aspektanta kiel askofrukto, pli malofte (*Phaeosporobolus*) konidioforoj, konidiodonaj ĉeloj k konidioj interne de konveksa stromo.
- CC** Sporodoñoj kapoformaj, pedunklaj, nigraj, aspektantaj kiel askofruktoj de *Calicium*, konsistantaj el konidioforoj ariĝintaj en faskoj ĉesupre divergaj, tiel formantaj globan kapon ĉ. 100 µm diametran, portatajn de ± tronkonusa piedo ĉ. 150 µm alta, ĉesupre 40 µm, ĉebaze 60 µm diametra ..... *Leightoniomyces*
- C** Sporodoñoj en formo de veruko aŭ de disketo je kelkaj centonoj aŭ dekonoj da mm diametraj.
- DD** Sporodoñoj ne nigraj. Hifoj k konidioj sen- aŭ apenaŭ-koloraj.
- EE** Konidioj 0-septaj.
- FF** Sporodoñoj pulvorecaj, ĉar konsistantaj el konidioforoj ne densaj.
- GG** Sporodoñoj (ĉ. 0,1 mm) unue flavaj, poste verdete brunaj, konveksecaj. Konidioj globaj, senkoloraj ..... *Milosprium*
- G** Sporodoñoj blanketaj. Konidioj ± longformaj.
- HH** Sporodoñoj (0,2-0,4 mm) ebensupraj. Konidioforoj neregule branĉaj, ĉefine portanta nur 1 konidion elipsoidan (4-6 x 2-3 µm) ..... *Acremonium* (1. A. spegazzinii)
- H** "Sporodoñoj" (0,5-5 mm) duonglobaj aŭ konusaj, ĝenerale kun ĉefina papilo, iom aspektantaj kiel blanketaj peritecioj, respondantaj fakte al ± globaj gajloj ruĝete brunaj sed laŭaspekto blankaj k pulvorecaj ĉar kovritaj de konidioforoj multaj sed ne kuntuŝaj. Konidioforoj mallongaj, nek branĉaj nek septaj, cii kun po 1 konidio (15-25 x 6-9 µm) senkolora, ĉebaze detranĉa ..... *Refractohilum* (3. R. peltigerae)
- F** Sporodoñoj kompaktaj, lafoje kornecaj, ĉar konsistantaj el konidioforoj tre densaj.
- GG** Sporodoñoj helege verdaj, konkavetaj ..... *Hypelia*
- G** Sporodoñoj rozaj, ruĝaj aŭ oranĝaj.
- HHH** Konidioj (5-8 x 4-6 µm) elipsoidaj. Sporodoñoj (ĉ. 1 mm) helege oranĝaj, lentoformaj, dense ariĝintaj sur micelialaj makuloj flavetaj. Konidioforoj finiĝantaj per bukedo da konidiodonaj ĉeloj (20-35 x 3-5 µm) 1-konidiaj ..... *Dendrodochium*
- HH** Konidioj globaj (4-7 µm) kuniĝintaj pro speco de mucilago sed facile disiĝemaj. Sporodoñoj (0,2-0,3 mm) helege rozaj, neregulsupraj ..... *Illosporium*
- H** Konidioj piro- aŭ kojno-formaj, izolaj. Konidioforoj septaj aŭ ne.
- II** Konidioj 11-15 x 7-10 µm. Konidioforoj (10-35 µm longaj; ĉebaze 3-9 µm dikaj) ĉebaze branĉaj. Sporodoñoj (0,1-0,2 mm) rozaj, ruĝaj



Dendrodochium

aŭ oranĝaj, subglobaj, maloftaj. Sklerotoj multaj, samaspektaj al la sporodoñoj ..... ***Marchandomyces***

**I** Konidioj 4-6 x 2-3 µm. Konidioforoj (20-30 µm longaj; ĉebase 2-3 µm dikaj) rektaj, senbranĉaj, kun supro maldikiĝinta, 1-piknidiaj. Sporodoñoj preskaŭ kuniĝintaj, konkavetaj, unue cindre grizaj, poste oranĝaj ..... ***Raffaelea***

**E** Konidioj laŭlarĝe septaj.

**FF** Konidioj (17-60 x 10-20 µm) konsistantaj el plurĉela filamento buliĝinta en amaso neregule globa aŭ longforma ..... ***Hobsonia***

**F** Konidioj ne konsistantaj el buliĝinta filamento.

**GG** Konidioj (60-120 x 2-4 µm) kurba, 2-5-septaj ..... ***Fusarium***

**G** Konidioj ≤ 60 µm longaj, 1-5-septaj.


**HH** Konidioj ĉ. 12 x 4 µm, krescentoformaj, 1-septaj ..... ***Fusisporium***

**H** Konidioj > 25 µm longaj, elipsoidaj aŭ spiniformaj, ĉebase ete detranĉaj ..... ***Cylindrocarpon***

**D** Sporodoñoj malhele brunaj aŭ nigraj.

**EEE** Konidioj 4-branĉaj, helege verdetbrunaj; el la branĉoj (4-16 x 1-2 µm), unu aŭ pluraj portas tre mallongan apendicon (2-5 x 0,5 µm). Sporodoñoj 0,1-0,2 mm ..... ***Choreospora***


**EE** Konidioj (17-40 x 4-9 µm) cilindro- aŭ klubo-formaj, senkoloraj, 1-opaj, laŭlarĝe 3-4-septaj, iaoje iom kurba, ĉebase distingible detranĉaj, precipe ĉesupre dikparietaj. Sporodoñoj 0,1-0,3 mm ..... ***Lichenopuccinia***



**h** = hifopodo    **k** = konidio

- E** Konidioj elipsoidaj aŭ globaj, 0- aŭ 1-septaj.
- FF** Konidioj ( $3-4 \times 2-3 \mu\text{m}$ ) verdetaj, 0-septaj, elipsoidaj, komencevolue kate-nete ariĝintaj. Konidioforoj ( $3-4 \times 2-3 \mu\text{m}$ ) septaj, senbranĉaj. Sporodoĥioj 0,5-1 mm ..... *Bloxamia*
- F** Konidioj malhele brunaj. Sporodoĥioj  $< 0,3 \text{ mm}$ .
- GG** Konidioj dekomence 1-opaj, globaj aŭ subglobaj ( $\hat{\phi} 12-13 \mu\text{m}$  diametraj), 0-septaj. Sporodoĥioj ( $\hat{\phi} 0,1 \text{ mm}$ ) elstaraj, duonglobaj, disaj sur la likeno ..... *Epicoccum*
- G** Konidioj almenaŭ komencevolue ariĝintaj en katenetoj aŭ amasoj.
